

FLANDRA

KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND

Steeds

goede foto's!

Met de Gevaert Panchromosa film, 't brochuurtje "Fotografeeren bij kunstlicht" en de Gevaert Belichtingstabel voor Kunstlichtfoto's is U zeker 's avonds thuis goede opnamen te maken.



Deze twee Gevaert uitgaven zijn gratis in den fotohandel verkrijgbaar.



FUKE-leden uit het Antwerpsche !

Voor uw _____

Heeren- & Kinderkleeding

GEMAAKT EN NAAR MAAT

is het beste adres :

J. PAESMANS

IN 'T DUIFKEN

Koepoortstraat 64, Antwerpen. - Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

LIKEURSTOKERIJ

DE RAAF

■ ALLE SPECIALITEITEN ■

ALLE GEKENDE WIJNEN

J. VANDEUN-JESPERS

TURNHOUTSCHE BAAN, 277

BORGERHOUT (ANTW.)

JAARGANG 3 (6)

Nr 9-10

SEPT.-OKTOB. 1938

FLANDRA KATOLIKO

Maandblad van het
Katholiek Vlaamsch
Esperanto-Verbond

K. V. E. V.



Monata Organo de
la Flandra Unuiĝo
Katolika Esperantista

F. U. K. E.

Redakcio: Patro C. v. Hoogstraten, O. Praem., Abatejo Grimbergen. (B)
Interŝang-adreso: F. U. K. E., Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout.

Abonoprezio: 15 fr. Kun membreco FUKAJ IKUE 20 fr. Abonoprezio por eksterlando 20 fr. P-konto 412.354 K.V.E.V. Aalst

FLANDRA UNUIĜO

DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F. U. K. E.

Kath. Vlaamsch Esperanto Verbond K. V. E. V.

Voorzitter: Lic. Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. **Ondervoorzitter:** Dr Marcel Naster, Naamsche straat 113, Leuven. **Proost:** E. H. A. Beckers, Professor, Normaalschool, Mechelen a. Maas. **Secretaris:** J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout. **Kassier:** K.V.E.V. Aalst, P-konto 412.354.

PROVINCAJ KAJ LOKAJ DELEGITOJ:

Antwerpen

ANTWERPEN
BORNEM
EDEGEM
EKEREN
GEEL
HOBOKEN
MERKSEM
MOL
Ste MARIABURG
WILRIJK

E. Paesmans, Koepoortstraat, 64, P-konto 4145.89
A. De Ridder, Boschkant, 1
R. Torfs, Verbindingstraat, 9
J. Van Gulck, Zuster Nathalielaan, 7
M. Gordon, kleermaker, Statiestraat, 3
J. De Groot, onderwijzer, Caronstraat, 31
H. Versavel, Bredabaan, 785
F-ino M. Bergmans, Markt, 19
Joz. Cammaert, Van de Weygaardlei, 12, P-konto 4274.93
D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14

Brabant

GRIMBERGEN
LEUVEN

E. H. Canisius van Hoogstraten, o. praem., abdijs
Petro De Fraye, Kapucienenvoer, 75, P-konto 4427.19

Limburg

BREE
HASSELT
St TRUIDEN

H. Beelen, professor, College
A. Tournel, Guido Gezellestraat, 5
Jean Put, Kasteel van Duras

Oost-Vlaanderen

GEERAARDSBERGEN
GENT

C. Bernaert, Pelgrimstraat, 1
M. De Valck, Meulestedesteenweg, 487

West-Vlaanderen

BLANKENBERGE
BRUGGE
KORTRIJK
LEDEGEM
LICHTERVELDE
OOSTENDE
ROESELARE

Fr. De Zutter, Wetstraat, 101
F. Roose, G. Gezellelaan, 15
P. Mattelaer, apotheker, Voorstraat, 40
F-ino Quagebeur, Statiestraat, 39
Kam. Ferijn, Wetstaat, 47
Maurice Hessens, Blauw Kasteelstraat, 86
H. Braekevelt, Statiedreef, 177

BIJDRAGE 1939

KOTIZO 1939

De nieuwe jaargang van ons maandblad en het nieuw financieel jaar van onze organisatie vangen aan in het begin van November. Daarom verzoeken wij vriendelijk onze leden en abonneuten reeds nu hun bijdrage te betalen en ons alzoo tijd en geld te sparen, want op het einde van November zullen we, aan diegenen die tot dan toe nog niet betaalden, een kwitancie laten aanbieden van 20.70 fr.

De bijdrage voor FUKAJ is 20 fr. en geeft recht op:

- 1) Abonnement op Flandra Katoliko;
- 2) Lidmaatschap van FUKAJ en IKUE (nationale en internationale organisatie);
- 3) Vermelding in en ontvangst van het jaarboek van IKUE, 1939.

Betaal dus aanstonds op postrekening nr. 412.354 van KVEV te Aalst.

De abonneuten op Espero Katolika, die hun abonnement voor het jaar 1939 verlangen te vernieuwen, doen goed reeds nu daarvoor 24 fr. er bij te voegen. Zij die nog de jaargang 1938 verlangen voegen er 15 fr. bij. Alles op dezelfde postrekening.

Het bestuur van KVEV.

La anoj kiuj bonvolas ŝpari al ni tempon kaj monon jam de nun repagas sian kotizon, ĉar komence de Novembro ni jam estos en la nova financa jaro de FUKAJ kaj je la fino de Novembro ni prezentigos kvitancon de 20.70 fr. al tiuj, kiuj intertempe ne repagis la kotizon. La kotizo por FUKAJ estas 20 fr.

Tiuj 20 frankoj rajtigas al:

- 1) Abono al Flandra Katoliko;
- 2) Membreco de FUKAJ kaj IKUE (nacia kaj internacia organizoj);
- 3) Mencio en kaj ricevo de la Jarlibro 1939 de IKUE.

Pagu do tuj al poŝtkonto de KVEV Aalst, no: 412.354.

La abonantoj al Espero Katolika, kiuj volas renovigi sian abonon por la jaro 1939 povas jam nun aldoni 24 frankojn, kaj tiuj kiuj deziras ricevi la jarkolekton de 1938 krome, aldonu 15 frankojn. Ĉio al sama poŝtkonto.

La Estraro de FUKAJ.

FLANDRA KATOLIKO

Om verschillende redenen verschijnt dit nummer later dan aangekondigd was. Het is echter dubbel, en omvat

tevens de Oktober-uitgave, zoodat dit het laatste nummer is van het loopende jaar. Men gelieve dus aanstonds zijn bijdrage te betalen voor het reeds begonnen nieuwe jaar. Redaktie.

LA KATOLIKA FAMILIO

Ĉeftemo de la Ljubljana IKUE-kongreso.

Ĉar la temo estas tiel interesa kaj ampleksa, mi volas en nia monata revuo ĝin iomete pli detale preparoli.

Oni povas rezumi la prelegon de Pastro Eras (Nederlando) en tiuj ĉi tri punktoj.

1) Sen troigo ni rajtas diri: la vivoforto de la socio kaj la vivofeliĉo de la homo, de viro, virino kaj infano estas definita per kaj dependas de la familio, kia Dio ĝin estigas, kia la naturo ĝin formis kaj kia ĝi estas perfektigita kaj sakramentigita de la katolikismo.

2) Estas nacia intereso ke ĉiuj fortoj estas aplikataj kaj mobilizataj por protekti la familion kaj kun la familio la bonajn morojn kaj socian vivon.

3) Kristo estu reĝo de la preĝanta, laboranta, oferanta kaj ĝojanta familio.

En la nuna moderna tempo estas ege utile kaj eĉ necese ke ĉiuj katolikoj havu klaran ideon pri tiu fundamenta temo de la homa vivo. Pluraj modernaj ismoj predikas novan doktrinon eĉ kontraŭbatalas nian katolikan familian koncepton. Ankaŭ la moderna vivkomplekso ne ĉiam estas favora al la natura evaluado de la katolika familio.

En la unua punkto ni diris ke la vivoforto de la familio aŭ, pli bone, de la socio kaj la vivofeliĉo de la homo dependas de la familio mem.

Ni povas eĉ aldoni ke ĝi ekzistas profite al aŭ malprofite al la disvastigo de la regno de Kristo.

La katolika agado devas zorgi ke ĝi vere ekzistas profite al la disvastigo de la regno de Kristo, tio ja estas ĝia laborkampo. Nu, al la konservado kaj disvastigado de la Ekle-

zio malmultaj fortoj povas fari tiom kiom la familio; al la animo kaj la volo de la infano la hejma vivo estas preskaŭ ĉiopova. Gepatroj, kiuj edukas la infanojn laŭ la katolikaj principoj, disvastigas la regnon de Kristo sur tiom da infanoj, kiom Dio bonvolis doni al ili, kaj pere de tiuj infanoj ili konigas Kriston al miloj da aliaj homoj eble.

Malkristanigitaj kaj mondumaj gepatroj kontraŭe preparas por la estoateco, senreligiajn kaj materialistajn homojn, kandidatojn por la moderna paganismo.

En la junec- kaj infanaroj ĉiu homo estas sub la influo de la religiaj kaj politikaj influoj de la hejma vivo, kaj poste kiel plenkreskuloj ili laŭ tiuj vivas. Klaran ekzemplon pri tio ni havas en la nuntempa Hispanujo.

La katolika lernejo nur iomete povas plibonigi la malbonan familian edukon. La katolika lernejo kontraŭe havas grandan kapablecon por doni vere kristanan edukon, se la gepatroj metis por tio la bonan fundamenton. La moderna katolika agado pro tio devas pristudi kiamaniere la familio devas labori por doni la plej grandan efikon al la disvastigado de la regno de Kristo. Kaj due la katolika agado devas pristudi kiamaniere ni devas agi por ke la familia vivo ne iĝu faktoro de malkristanigo.

Cio kion oni povas diri pri tio, ni rezumas en tri punktoj, kiujn ni pritraktos poste pli detale.

- 1) Kio povas detrui la kristanan koncepton pri la familio mem.
- 2) Kio kontraŭbatalas la kristanan edukon.
- 3) Kio la gepatroj devas fari por doni al siaj infanoj perfektan kristanan edukon kaj kiamaniere ni ĉiuj devas agi por la defendo kaj la perfektigo de la katolika lernejo.

A. B.

.. Rookt ..
JAMAYCA
 DE FYNSTE DER SIGAREN



Rijke keus in cigarillos
 Sigarenfabrieken JAMAYCA, Arendonk
 (oni korespondas en Esperanto)

ESPERANTISTOJ!

Ĉiam konsultu por viaj vojaĝoj

«Ultra Montes»

La plej belaj vojaĝoj je la plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46
 Korte Nieuwstr. Tel. 276.51 & 303.50.

Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17.53.44

Ĉiuj katolikoj devas ami kaj alceli la pacon. Katolikaj Esperantistoj faru tion duoble.

LA GRANDA DEFENDO

Ni bedaŭras ke pro nia foresto tiu ĉi artikolo ne povis aperi pli frue.

Nuntempe ni travivas simplajn tagojn. Kion alportos la tago de morgaŭ? Ĉu paco aŭ militon? Ni preĝu kaj esperu!

En sia Kristnaska anonco de 1933 Lia Papa Moŝto Pio XI citis la vortojn de Napoleono I, kiu diris: la unua, dua kaj tria, kion ni bezonas por militi estas..... mono. Pio XI ŝanĝis tiujn vortojn kaj diris: la unua, dua kaj tria, kion ni bezonas por konservi la pacon estas... la preĝo.

Septembro 1938. Timplenaj tagoj de malfrankvilo. Ĉu morgaŭ alportos novan mondmiliton? Chamberlain iris al Berchtesgaden. En la stratejo de Londono la homoj genuflekse preĝis, por ke la maljuna ministro revenu hejmen kun paco. En Lourdes, en Montmaitre, en ĉiuj sanktejoj kaj preĝejoj, preĝoj estis petataj por la paco. La Papo, la Episkopoj instigadas nin al preĝo.

La mondo staras sur sia kapo. Ĉu povas homo, kiu scias kio estas milito, profunde senti, ke li homo per tuta sia forto ne volus juri pri tiu katastrofo? Kaj tamen, ĉu estas Patro aŭ Patrino kiu nuntempe ne timas?

Kaj tamen... ni sentas tion, la katastrofo minacas.

Kaj tamen, savo estas ebla. Tamen estas armilo kontraŭ la milito, kie homtratoj mortigas unuj la aliajn. Iru al la Patro kaj de Li genuflekse petegu la plej bonan, la pacon. De Li kaj de la Dipatrino! Ĉu ŝi ne estas la Patrino de ni ĉiuj, de Sudetoj kaj Ĉeĥoj, de Germanoj kaj Francoj... La Patrino?

Ne, ni ne primokas, kiam angla ministro iras al Berchtesgaden aŭ Godesberg. Ni admiras tiun paciganton, kiu eble home riskas. Ni admiras ĉiujn kiuj volas oferi por la paco. Sed ĉe la klopodoj de kelkaj, ni volas tiun grandan armilon, nin okupi per la pacarmilo, la preĝo.

La iluzio, la erara opinio de nia homa povo estas tiel ofte ege seniluziigata. Oktobra

monato, rozaria monato. Al Patrino ni iras kun la rozario en la mano.

Patrineto, ni, viaj infanoj, petegas de vi la pacon. Sankta Maria Dipatrino preĝu por ni, nun kiam la mondo estas skuata de frenezaj homoj, kiuj nur alcelas militon. Vi, aminda Patrino, Reĝino de Paco, petu por ni la plej bonan. Via infano jam alportis la pacon al la homoj bonvolaj.

Donacu al ni la anĝelkanton de Paco. Silentigu la buŝegojn de kanonoj, la susuradon de la motoroj de bombardaj aviadiloj.

Ni ekprenu la grandan defendilon, la solan pacarmilon,... la preĝon.

Jos. Debus, Geluwe.

La «Katholieke Jongeren Vredes-Aktie» aldonis al sia organo «Vredesaktie» flava kvarlingvan folion, kies ĉefpaĝo, kun la bildo de Sankta Alberto la Granda, estas en Esperanto. Jen la teksto de tiu paĝo:

KVARA INTERNACIA PREĜSEMAJNO POR LA MONDPACO.

«Estas pli bone konfidi al la Sinjoro, ol fidi al reĝoj» (Ps. 118, 9).

La paco estu kun vi!

AL ĈIUJ KRISTANOJ EL LA MONDO

Karaj gefratoj,

Depost la mondmilito, la fulmotondraj nuboj neniam tiel densiĝis super Eŭropo kaj la mondo kiel nun. Home parolante, ni troviĝas antaŭ profundega abismo, ĉe la vesperigo de la pereco de la okcidenta civilizaĉio.

Kaj tamen ni petas vin, refoje kunigi viajn klopodojn kun la niaj. Ĉar se estas vere ke homa helpo ŝajne estas malebla, tamen restas vera la vorto de la S. Skribo: «Estas pli bone konfidi al la Sinjoro, ol fidi al reĝoj».

Denove ni kune tenos la 4an internacian porpacan preĝsemajnon. Kune kun nia patrino, la sankta Eklezia Doktoro, Alberto la Granda, ni kun infana fido, nin direktas al la Ĉiopova kaj Saĝa Patro, por ke Li donu

al ni forton por daŭre prilabori la venon de Lia Regno, kaj benu niajn klopodojn.

Sube vi rimarkas la programon de la preĝsemajno. Ni petas tuj vian aliĝon, kaj sciigu al ni kiuj paroĥoj, monaĥejoj, asocioj aŭ grupoj partoprenos la preĝsemajnon. La « Preĝo por la Paco » estas havebla en Franca-Esperanta, Nederlanda-Latina kaj Germana-Angla tekstoj. Mendo de minimume 2000 ekz. rajtos elekti alian lingvon, en kiu ni ivolonte presos la preĝon.

Oni mendu, por ĉiuj landoj: po 1,50 Belga por 100 ekz., ĝiro Bruselo 4332,54, de la « Katholieke Jongeren Vredes-Actie, v. z. w. » (a.s.p.c.), Verbondstraat 68, Antverpeno, Belglando; aŭ per alsendo de internacia postĉeko al la supra adreso.

Ĉiuj alsendkostoj estas entenataj en la prezo. La mendoj nur okazos post ricevo de la ŝuldita sumo.

Samtempe ni petas vin multe propagandi la preĝsemajnon, kaj zorgi por publikigado de nia alvoko en viaj ĵurnaloj kaj revuoj. En atendo de viaj favoraj novaĵoj, ni prezentas al vi niajn fratajn salutojn en Kristo.

Katolika Junulara Porpaca Agado.

KVARA INTERNACIA PREĜSEMajNO POR LA MONDPACO.

Ĉirkaŭ la festo de Sankta Alberto la Granda Episkopo kaj Doktoro de l'Eklezio, Patrono de la Mondpaco, de la 11a ĝis 18a de Novembro 1938.

Intencoj de la preĝsemajno:

Vendredon 11. Militaltoftago. Povu la militalto, en kiu ni ankoraŭ vivas, ŝanĝiĝi en reala paco.

Sabaton 12. La interna paco por la izolulo, per lia plena subiĝo al Dio.

Dimanĉon 13. La paco en la familioj, per la reordigo de amo, fido kaj obo.

Lundon 14. La paco en la ŝtato, per rilatoj inter la superuloj kaj subuloj.

Mardon 15. Patrona festo de Sta Alberto la Granda. Pacferio. La paco en la eklezioj, per la reveno de ĉiuj al la vera lumo de Kristo.

Merkredon 16. La paco en la Socio per justaj sociaj rilatoj.

Ĵaŭdon 17. Nacia kaj internacia malarmado per nenigo de la militservo laŭ la konsilo de L. P. M. Benedikto XVa, formontinta.

Vendredon 18. Festo de la konsekro de la basilikoj de Sktaj. Petro kaj Paŭlo en Romo. La paco inter la popoloj per reciproka tolerado kaj justeco.

Speciala intenco por 1938:

Ke Eŭropo ree honoru la potencon de la Rajto, anstataŭ la rajton de la potenculo.

WANNEER U KORRESPONDEERT!

Gebruik dan altijd:

K. V. E. V.-brietpapier en omslagen,, per 100:	15.— fr.
K. V. E. V.-postkaarten, per stuk:	0.10 fr.
Briefomslagen alleen, de 100:	6.— fr.
Of vraag een F.U.K.E.-paketo, inhoudende: 25 postkaarten, 20 vel-len briefpapier en 20 omslagen, aan,	5 fr.

Om kennis te maken met Esperanto en tevens iets te vernemen over onze organisatie koope men de

Beknopte Spraakleer

door P. Maassen.

Prijs 2 fr., waarvoor dan bovendien de "gele brochure" gratis wordt toegezonden.

Om wat meer te weten over nut en geschiedenis van onze beweging, bestelle men

De spijker op den kop geslagen met praatjes en plaatjes. Prijs 2,50 fr. (zie recensie in F. K. n° 7.

DEZE BOEKJES ZIJN ONMISBAAR VOOR UW PROPAGANDA!

Verkoopinstituut van F.U.K.E.

Egied Segerslaan 14, Wilrijk.



XXIa I. K. U. E. - Kongreso XXIste I. K. U. E. - Kongres

5-11 AŬG. ANTVERPENO 1939.

5-11 Aug. Antwerpen 1939.

Dimanĉon la 30-an de Oktobro okazis en Antverpeno la unua grava estrarkunveno koncerne la IKUE-kongreson, kiun F.U.K.E. organizos sekvantan jaron en tiu urbo. Ni povas jam mallonge konigi kelkajn informojn. Dank' al la sindona helpo de niaj antverpenaj amikoj, ni povas atendi ke la XXIa IKUE-kongreso estos vere brila kongreso, eble la plej impona el ĉiuj IKUE-kongresoj ĝis nun okazintaj.

UNUAJ INFORMOJ

Honora Komitato. Ĉiuj Episkopoj de Belgio volonte akceptis la membrecon de la honora komitato, kies Prezidanto estas Lia Eminenca Moŝto Kard. van Roey, ĉefepiskopo de Mehelen.

Loka Kongres-Komitato.

Prezidanto de la LKK estas nia sindona Sekretario J. V. Deun; Sekretario estas Sro Hartman, Potgieterstr. 1, Antverpeno; Kasisto estas Lic. L. Calloens, nia eminenta Prezidanto. Poste ni publikigos la kompletan liston de komitatanoj.

Dato.

Oni fiksas la daton tiel, ke ankaŭ partoprenintoj de la Universala Kongreso povu ĉeesti. La Kongreso komenciĝos la 5an de Aŭg. vespere kaj finiĝos la 11an matene.

Kotizo.

Ĝis la fino de Marto la kotizo estas 40 flr. poste 60 fr. Per frua aliĝo oni ŝparas do 20 fr.

Edzinoj de partoprenantoj kaj gejunuloj ĝis 18 jaroj pagas la duonon.

Oni pagu per poŝtkonto: no 415.470 de « XXIa Kongreso de IKUE » Erembodegemstraat 29, Aalst.

Zondag 30 Oktober had in Antwerpen de eerste groote bestuursvergadering plaats, met het oog op het Internationaal Katholiek Kongres dat toekomend jaar daar door F.U.K.E. georganiseerd wordt. De omstandigheden en vooral de opoffering van onze Antwerpsche leden laten voorzien, dat dit kongres buitengewoon zal slagen, misschien zelfs het prachtigste IKUE-kongres zal zijn van alle tot hier toe gehouden.

EERSTE MEDEDEELINGEN

Eere-komiteit.

Hunne Excellenties de Bisschoppen van België hebben allen volgaarne het lidmaatschap aanvaard van het eerekomiteit, waarvan Zijne Eminentie Kard. van Roey de Voorzitter is.

Plaatselijk Kongres-komiteit.

Voorzitter is onze ijverige sekretaris J. V. Deun; Sekretaris is de Heer Hartman, Potgieterstraat 1, Antwerpen; Kasier, onze Voorzitter, Lic. L. Calloens.

De volledige lijst van het Komiteit zal later verschijnen.

Datum.

Om toe te laten dat ook deelnemers van het Universala Kongreso in Bern, op ons kongres kunnen tegenwoordig zijn, heeft men besloten het kongres te openen 5 Aug. 's avonds en te sluiten 11 Aug. 's morgens.

Bijdrage.

Tot einde Maart bedraagt de bijdrage 40 fr. daarna 60. Men heeft er dus belang bij zich vroeg op te geven.

Echtgenooten van deelnemers en de jeugd beneden de 18 jaar betalen de helft.

Men storte het bedrag op postrekening no

Ekskursoj.

Oni estas intertraktanta pri aranĝado de belaj ekskursoj, ekzemple al Lier, Mehele, Leuven; al la famaj grotoj de Han; al parko kaj muzeo de Tervuren; ktp.

Teatraĵo.

Anoj de « Suda Kruco » el Eindhoven prezentos belan teatraĵon de flandra verkisto.

Filmado.

Verŝajne la kongreso estos filmota. Se vi deziras vidi kiel vi mem moviĝas, venu al Nia XXIa!

Glumarkoj kaj Afişoj estas preparotaj.

ALIGU TUJ!

Help mede ons ledenaantal verdubbelen nog vóór het IKUE-kongres te Antwerpen!

ESPERO KATOLIKA.

Wegens de toestand in Tsjecho-Slowakije is het Septemhernummer van Espero Katolika slechts gedeeltelijk bij de abonneuten toegekomen. Het Oktobernummer is op komst.

KONGRES-LIBRO.

Exemplaren van het luxe-kongresboek van Ljubljana, 70 bladzijden met 45 fotos, waarvan 4 in veelkleurendruk, zijn te bekomen op ons Verkoopinstituut, Egied Segerlaan 14, Wilrijk. Prijs 10 fr.

BONA RIMEDO.

Kiam ni antaŭ kelkaj semajnoj demandis al legantino de Flandra Katoliko en Nederlando, ĉu ŝi partoprenos al Nia XXIa en Antverpeno, ŝi respondis: verŝajne ne, mi ne havas konatulojn (= kiuj vojaĝas kun mi kaj akceptas min en Antverpeno) mi estos sola. Jen la motivo de tiu fraŭlino por ne ĉesti la kongreson. Eble multaj pensas tiel. Al tiuj ni sciigas ke por ilia malsano jam estas eltrovita bona rimedo. Nome konatiĝu antaŭe kun aliaj partoprenantoj, per ko-

415.470 van « XXIa Kongreso de IKUE », Erembodegemstr. 29, Aalst.

Excursies.

Er zal gezorgd worden voor het inrichten van interessante excursies, b.v. naar Lier, Mechelen, Leuven; naar de grotten van Han; het Park en museum van Tervuren, enz.

Tooneelopvoering.

Door leden van « Suda Kruco » uit Eindhoven zal een tooneelstuk worden opgevoerd in Esperanto.

Filmopname.

Waarschijnlijk zal van het kongres een filmopname gemaakt worden, iets waaraan vooral de groepen aandacht op moeten geven.

Plakzegels en Aanplakbiljetten

zijn in voorbereiding.

GEEFT U NU OP!

respondado. Por tio metu en Flandra Katoliko anoncon, en kiu vi konigas vian deziro pri korespondado kaj eventuala kunvojaĝo kun personoj laŭ via elekto.

Prezo de anonco: ĝis 20 vortoj, 5 fr.; por ĉiuj 10 vortoj plie, 5 fr.

I. K. I.**GOUDEN JUBILARIS.**

Op 13 November a.s. zal de Eerwaarde Frater Monulfus, directeur van het nieuwe fraterhuis « De Vliert » in 's Hertogenbosch, den dag herdenken waarop hij 50 jaren geleden werd opgenomen in de Congregatie van de Fraters van Tilburg. Frater Monulfus is sinds jaren de ijverige sekretaris en tevens de vurige propagandist van onze geloofsverkondiging door middel van Esperanto (I. K. I.). Namens alle vrienden uit België bieden wij den jubilaris ons aller hartelijkste gelukwensen aan en bidden God hem nog lange jaren voor het heerlijke werk van I. K. I. te sparen.

A. Van der Pluym, onderp. Wandre.
Vertegenw. van I. K. I. voor België.

Raporto de FUKÉ - ano kiu vizitis la jubilean kongreson.

LA JUBILEA.

Sajne la Flandroj veturis Slovenion kun armilitaj, almenaŭ kun strategiaj celoj, ĉar ni invadis ĝin per la Nordo tra Germanujo — estis la vojo pli mallonga, kiu poste

montriĝis ankaŭ pli danĝera, — dum la dekstra flanko elektis la okcidentan vojon, la italan, haltis en Postumia, kie ĝi renkontis Dron Adamon Zamenhof kaj familion — ne malbona preparo por Esperanto-kongreso kaj pluveturis kun parto de la nederlanda karavano. Ĉar la Slovenoj ne estas timemaj homoj, ili akceptis ĉiujn tre ĉarme, pro kio ni denove elkore dankas ilin.

Ankaŭ pro la tuta kongreso ni sankas, ĉar sume ĝi bone sukcesis dank' al iliaj daŭraj penadoj por nia bonfarto. La kongreso estis ne nur alte protektata, sed ĝi la aktivan interesigon kaj ĉeeston de la Princepiskopa Moŝto de Ljubljana, Monsro. D-ro Gregorij Rozman, kaj de Lia reprezentanto, Sac. Moŝto Prof. D-ro Janko Sedej, kiu partoprenis ĉiujn kunvenojn kaj aranĝojn; siadanke la gazetaro simpatie raportis en slovena lingvo. La vetero estis ĝenerale bona kaj agrablis nian restadon en la universitata urbo, cetere tre ĉarma pro ĝiaj barokpreĝejoj kaj ĝia agrabla situo ĉirkaŭ sia kastelmonteto; ne senkiale la Romanoj jam okupis tiun lokon.

Ni jam atentigu pri **grava decido** prenita pri la venontaj kongresoj: por ne malhelpi la sukceson de la Eŭkaristiaj Esperantomondkunvenoj venontaj, kies unua okazos dum la Eŭkaristia Mondkongreso de Nice en 1940, IKUE decidis ne okazigi kongreson en tiuj jaroj, tiel ke estonte la IKUE-kongresoj okazos ĉiun duan jaron; tio por niaj planemaj anoj kaj amikoj.

Ni alvenis **sabatvespere**, rapide enboteliĝis kaj post refreŝigo ĉeestis la **INTERKONATIGAN VESPERON**. Dumtage jam okazis la malfermo de Artekspozicio kaj de Filatelistspozicio, kiujn ni vizitis poste dum libera horo. Baldaŭ ni trafolumis niajn kongresdokumentojn, inter kiuj, krom la esperantlingvaj prespektoj pri Slovenio, meritas specialan laŭdon la *kongreslibro* agrabla ilustrita kaj vere poŝformata.

Alparolis kaj bonvenigis nin Anton Sterič, prezidanto de Slovena Esperantista Asocio kaj de LKK, kaj Damjan Vahen, sekretario



Lia Episkopa Moŝto D-ro Greg. Rozman, princepiskopo de Ljubljana, protektanto de nia XXa, kiu bonvolis dufoje celebri sanktan Meson por la kongresanaro, ĉeestis kunvenojn kaj per entuziasma parolado laŭdis nian movadon kaj instigis plue labori.



XXXI Universala Kongreso de Esperanto.

Bern (Svisujo), 29 Julio - 5 Aŭgusto 1939.

ORGANIZA KOMITATO :

Honora prezidanto : J. Schmid, prezidanto de 9a Kongreso 1913.

Prezidanto : H. Buchli, direktoro de Berna trafikoficejo.

Vicprezidantoj : D-ro W. de Leiber kaj lia reprezentanto de la urbestro.

ADRESO POR LETEROJ : 31a Universala Kongreso de Esperanto, Bern.

KONGRESEJO : Kasino, urba koncertejo.

KOTIZOJ : Ĝis 31-12-38 svisaj frankoj 20 ; ĝis 31-3-39 sv. fr. 25 ; post tiu dato sv. fr. 30. La edzo aŭ edzino de kongresano, same

gejunuloj ne pli ol 20 jaraj pagas la duonon de tiuj sumoj. Plej oportune vi pagas al nia poŝtkonto III 11611 aŭ per svisaj monbiletoj aŭ al nia bankkonto ĉe Volksbank, Bern.

BLINDULOJ : Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpage kongreskartojn, sed iliaj aliĝoj estu aprobitaj.

ALIGILOJ : Haveblaj ĉe la kongresoficejo, ĉe la ĉefgazetoj kaj Landaj asocioj kaj ankaŭ ĉe la sekretario de FUK.

DONACIOJ : Donacoj helpas al plena sukceso de la kongreso kaj la Organiza Komitato antaŭdankas al donacantoj.

BLINDULA KASO : Por ebligi al blinduloj la kongrespartoprenadon la Organiza Komitato danke akceptas donacojn por tiu kaso.

GLUMARKOJ : Ĉarmaj glumarkoj haveblaj. Prezo : 60 centimoj (svisaj) aŭ du internaciaj respondkuponoj por 50 ekz.

FAKAJ KUNVENOJ : Organizontoj bonvolu frue anonci siajn dezirojn.

OFICIALA KONGRESGAZETO : Ĉiu kongresano ricevos la kongresgazeton « Ni vo-

goslava Katolika Esperantista Ligo, post kio Prof. Janko Sedej, nome de la Princepisko-



Petro Golobič, prezidanto kaj fondinto de Jugoslava Katolika Esperanto Ligo.

LA JUBILEA

de ambaŭ organizaĵoj. Poste aktore recitis Sro Milan Skrbinišek el verko de Damjan Valien kaj el Hamleto de Zamenhof ; certe estis tre arta deklamo sed ĝi elikis iom emfaze en nia salono de Hotelo Metropol. Plue la vespero agrable daŭris en babiladoj inter malnovaj kaj novaj gekonatumoj.

Dimanĉmatene, la 7an de Aŭgusto, ni jam frue renkontiĝis ĉe la katedralo kie la Princepiskopa Moŝto pontifike celebris por ni la S. Mesa ; predikis P. Modesto Carolli, O. F. M., el Italujo ; poste ni iris kune al la franciskana salono por la SOLENA MALFERMO de « Nia XXa ». Fakte ni ne nur jubileas pro nia XXa IKUE-kongreso en si mem, sed ni povas ankoraŭ pli fieri ĉar dum ĝi ni prifestas la 35-jarajn datrevenojn de la fondiĝo de nia internacia organo Espero Katolika kaj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista mem. Jen nekontraŭdireblaj faktoj kiuj pruvas la daŭran sukceson de nia Katolika Esperanto-movado.

Enkonduke parolis, nacilingve kaj Esperante, Sro Peter Golobič, prezidanto de Ju-

kas vin », de kiu aperos 8 numeroj, la lasta enhavos la raporton pri la kongreso. La unua numero estas multnombre forsendata kiel varbgazeto ; nevizitonoj de la kongreso estas petataj transdoni ĝin al interesuloj aŭ anonci ties adreson al LKK.



BONA NOVAĴO POR ESPERANTISTAJ POŝTMARKKOLEKTANTOJ.

Por efika interŝanĝado de la poŝtmarkoj inter diversaj popolanoj, kiuj samtempe havu plenan garantion por senditaj valoraj oni fondis « *Interŝanĝa Rondo Internacia* ». Ĝi baziĝas sur absolute sekura fundamento, tiel, ke la sendinto povas ĉiam esti certa je ricevo de kontraŭvaloro por sia varo.

Jen la regularo, klara kaj densigita :

1. Nomo : Interŝanĝa Rondo Internacia (IRI).
2. Sidejo : Ljubljana Jugoslavujo.
3. Celo : Perado de interŝanĝo kaj garantio por la sendita varo.
4. Anoj : Aliĝi, kiel ano, povas ĉiu serioza filatelisto, el ĉiu lando de la mondo.

LA JUBILEA

pa Moŝto, kiu devis forvojaĝi, salutis, same naci- kaj esperantlingve, la kongresanaron kaj deklaris la XXan IKUE-kongreson malfermita. Sekvas paroladoj de Dro Orel, reprezentanto de la banuso (provincestro) de Drava banusejo, kaj de la vicurbestro de Ljubljana. Sro Heilker tiam faras la malferman paroladon kaj donas la parolon al la **naciaj reprezentantoj** por saluti la kongreson : sinsekve parolas esperant- kaj nacilingve Sac. Beclers por FUK kaj Belgio, Sro Buhr por Ĉeĥoslovakujo, Sro Galais (franco) nome de la blinduloj, Sac. Vernoux por la franca ligo, Sro Chiba por Aŭstrujo, Prof. Cambelana Moŝto Fr. Erdey por Hungarujo, P. Carolli por Italujo, Sro Vahen por Jugoslavujo, Sro Damen por Nederlando. Sino Cense por Polujo. Nepre atentinde estas ke tiun parton de la malferma kunsido disaŭdigis RADIO-LJUBLJANA.

Envenis multege da salutoj kaj bondeziroj al la kongreso el multaj landoj ; mi nur notu tiujn de la jugoslava religia konsilanto, de la Prezidanto Sro Calloens, de Finoj Lar-

5. Intertraktado kaj intersendado : En Esperanto, prefere per la aerpoŝto, sed rekomendite.

6. Rimedoj : Ĉiu ano pagas aliĝkotizon en sumo de 1 svisa franko. Por administraciaj elspezoj oni elprenas po 10 % el ĉiu alsendita kajero.

7. Maniero : Oni interŝanĝas laŭ katalogo Michel.

Ĉiu ano ricevas apartan numeron, sub kiu li sendas elektkajerojn kun engluitaj poŝtmarkoj en valoro de 100 Michel-markoj aŭ pli ol cento. Unu kajero de 100 Michelmarkoj restas kiel garantiaĵo en administracio de IRI. Por la aliaj kajeroj la sendinto ricevas saman kvanton de elektkajeroj, de tiu lando de kiu li deziras. El tiuj kajeroj ĉiu ano povas elpreni deziratajn pm. Poste la kajeroj devas esti resendataj al centro, por prialkulo.

8. Garantio : Por ĉiu rekomendite sendita kolekto de elektkajeroj la IRI garantiis per ĉiuj disponeblaj rimedoj. Ke la poŝtmarkoj estas originalaj kaj nefalsaj, garantias ĉiu sendanto.

roche kaj Royer el Parizo, kaj ankoraŭ multajn aliajn el Germanujo (eĉ poemo estas inter ili), Nederlando, Polujo, Francujo, Hungarujo, Anglujo, Litovujo, ktp.

Ni sendas **telegramojn** al Lia Papa Moŝto, al la Ĉefepiskopo de Jugoslavujo kaj al la Reĝo. Sro Heilker bonvenigas katolikan ĵurnaliston, kunlaboranton de Slovenec, kiu ĉeestas, kaj dankas la aŭtoritatulojn pro iliaj afablaj ĉeesto kaj paroloj. Li ankaŭ bonvenigas la ĝeneralan vikarion de la diocezo, Lia Moŝto Ignacij Nadrah, poste proponas prezidantaron por la kongreso, nome Srojn Golobič kaj Damen, kaj nomas raportistojn Srojn Anton Sterlé kaj Vahen.

Estas tiam la parolvico al diversaj **reprezentantoj**, inter kiuj Fino Fiedler por la klubo de Pecs (Hung.) — ŝi nome faras tre edifan paroladon pri la S. Eŭkaristio, — Sino Berková por la Brnoa klubo, sro Krysta, el Ĉesky Teŝin (Ĉeĥ.), por regiona Esperanto-Ligo, Inspektoro Strukelj, nome de Ligo de Katolikaj Instruistoj, sekcio de Asocio de Slomšek, kaj Sac. Pokorny por la klubo de Novy Jičín (Moravio-Ĉeĥ.). Sro Heilker dankas al ĉiuj kaj al la radiostacio, kaj

Se ekzistas dubo je originaleco de iu poŝtmarko, la gvidantaro lasas ĝin elpruvi.

Se tia poŝtmarko estas falsa, la posedanto (sendinto) pagos la elspezojn, se ĝi ne estas falsa la IRI mem pagos la elspezojn.

La administracio sendas laŭ maniero kiu estas plej oportuna. Plej malalta valorsumo en unu kajero estas Michelmarkoj 100. Anoj kiu misuzas la konfidon, estos juĝe persekutata.

En ĉiu lando aŭ regiono oni serĉas delegitojn de IRI.

Aliĝu al IRI kaj varbu por IRI, kiu estas serioza organizo.

Adreso: Anton Sterlé, gvidanto de IRI, Cesta 29, oktobra 5, Ljubljana Jugoslavujo.



EL PUEBLO.

Zooals we reeds aankondigden publiceert het groot katholiek Argentijnsch morgenblad « El Pueblo » voortaan artikels in Esperanto. Ofschoon de Esperantobeweging in Argentinië veel katholieken telt, bestaat daar nog geen bij IKUE aangesloten katholieke

Esperantobeweging. Het is daarom van belang dat wij Katholieke Esperantisten, *talrijk* kaarten en brieven schrijven naar de bestuurders van het groote dagblad, waarin we hem danken voor zijn steun aan de Esperantobeweging en tevens zijn aandacht trekken op het bestaan van een *internationale katholieke Esperantobeweging*, hem vragende dat zijn katholiek dagblad dat ook buiten Argentinië veel gelezen wordt, meewerke om in Amerika een vurige katholieke Esperantobeweging in het leven te roepen.

Schrijft dus allen naar: *Sinjoro Sanguinetti, direktoro de « El Pueblo », strato Piedras 567, Buenos Aires, Argentino.*

Alle ontvangen korrespondentiestukken zullen worden tentoongesteld in de hal van het dagbladgebouw. **Katholieken, aan uw schrijftafel!**



NOVA ESPERANTOGAZETO.

En la lastaj jaroj novaj Esperantogazetoj ekzistas kiel fungoj. Ni nun ricevis jenan informon el Groesbeek (Nederland):

« En la monato Oktobro 1938 aperos «La

de la homaro, sed forgesas plejofte, ke tiu savo devas komenci ĉe la familio.



Anton Sterlé, prezidanto de la ekzekutiva kongreskomitato.

LA JUBILEA

super ĉio al la lando kaj la urbo kiuj nin tiel afable akceptas, kaj invitas ĉiujn kuniri, post la «fermo de la malfermo», al la Kongresplaco por esti **fotografataj**.

Kaj tiel okazis; eĉ dufoje oni fotografis nin, kaj dume certaj povis, malgraŭ la suno kiu ĉiel entrudiĝis en iliajn okulojn, rimarki ke alte antaŭ ni gaje flirtas la verda standardo sur la kastelturo. Poste nin kunigis komuna **tagmanĝo** en hotelo Metropol kaj, refortigitaj, ni ekiris por viziti la urbon.

Je la 17a ni retroviĝis en la salono de Metropol por aŭskulti la pritrakton de la **ĉeftemo** de nia kongreso: **LA KATOLIKA FAMILIO**. Ĝin majstre faris Sac. H. Eras, religia konsilanto de Nederlanda Katoliko.

Li klarigis kiel ĝuste en ĉi tiu tempo estas nepre necese atribui kaj doni al la familio ĝian ĝustan signifon. La familia vivo estas ja la kerno de ĉiu vivo. Aŭtoritato, amo kaj kompreno formas gravajn angulŝtonojn de tiu familia vivo.

Oni multe parolas nuntempe pri la savo

Granda Familio», monata Esperantogazeto por la tutmonda Esperantistaro. Ĝi estos okpaĝa, formato de ordinara taggazeto, eldonado sur kooperativa bazo. La nura legado de la unua numero certe instigos al tiu abono.

Petu provekzempleron al la redaktoro: Carl Franzmann, Groesbeek apud Nijmegen, Nederl.»

Ni ankoraŭ ne vidis la novan gazeton kaj do ne jam povas prijuĝi ĝin.



ESPERANTO BIJ HET ONDERWIJS.

In Nederland hebben de samenwerkende Esperantoorganisaties sedert eenigen tijd een bureau « Esperanto bij het Onderwijs » opgericht. Hierbij zijn reeds 89000 personen aangesloten, waaronder de meeste onderwijzersorganisaties, zooals b.v. K. O. V. (Katholiek Onderwijzers Verbond) met zijn 12000 leden.

Reeds lang werkt men ervoor Esperanto in de scholen te doen invoeren. Er was echter te weinig eenheid in aktie. Om langzaam maar zeker tot praktische resultaten te ko-

men is het van groot belang, alle verspreide krachten te vereenigen, nationaal en internationaal, en de naar omstandigheden verschillende behoeften te onderzoeken en mogelijkheden uit te buiten. Dat is het doel van instellingen als het Nederlandsche bureau « Esperanto bij het Onderwijs ». Ofschoon het bureau beoogt de invoering van Esperanto in de Nederlandsche scholen, zoekt het toch internationaal kontakt en samenwerking, omdat dit voor de werking op nationaal terrein ook van groot nut is.

Om gelijkmatig internationaal te kunnen werken, moeten dergelijke bureaux in de verschillende landen tot stand komen, die dan elk volgens nationale omstandigheden, hun aktie inrichten. De taak van die bureaux bestaat vooral hierin: de publieke opinie te beïnvloeden ten gunste van de invoering van Esperanto, hulp en steun te zoeken bij invloedrijke instellingen en organisaties, zooals ministeries van Onderwijs, onderwijzersbonden, parlamentsleden, enz. alsook b. v. te bewerken dat vele onderwijzers Esperanto leeren.



LA JUBILEA

Popolo kiu lasas degeneri sian familian vivon, pereos.

Sed ankaŭ por la homo mem la familia vivo havas, eĉ ne atentante ĝian supernaturan karakteron, eksterordinarajn signifon kaj valoron.

Familia vivo estas unu el la plej altaj valoroj. La patrineco havas netakseblan valoron en siaj multaj aspektoj.

La batalo por aŭ kontraŭ Kristo iĝis batalo por aŭ kontraŭ la katolika familia vivo, kiun oni el multaj flankoj klopodas elartikigi.

Restarigo de la homaro, konkludis Sac. Eras, nur estas trovebla same pere de la familio: Vivu Kristo, Reĝo de la Familio».

Vigraj aplaŭdoj montris ĉies aprobon kaj plenan konsenton pri la brila pritrakto de tiu temo, kiun nia religia konsilanto, kiel li ankaŭ jam faris okaze de sia kongresprediko, detaligis en religia artikolo, je kiu mi altiras vian specialan kaj bonvolan atenton.

Sac. Eras tiam resumis sian referaton en tri tezoj, kiujn la kongreso, post ŝanĝo aŭ

pliprecizigo de nur kelkaj apartaj vortoj, unuanime akceptis.

Kelkaj ĉeestantoj ankaŭ faras rimarkojn pri la praktikaj flankoj de la problemo, nome en la lumo de la Sociaj Enciklikoj, kaj estas konsentite ke I. K. U. E., pere de Espero Katolika, devos informi kaj konsili tiurilate. Sroj Berka kaj Heilker ankaŭ instigas al traduko de la temoj en la naciajn lingvojn kaj publikigo; kaj Sroj Heilker fermas la kunvenon per la kristana saluto.

Je la 20,30, okazis en la franciskana salono la SOLENA AKADEMIO, despli sole na ĉar ĝi estis honorigata de la bonvola ĉeesto de la alta Protektano, *Lia Princepskopi*! *Moŝto de Ljubljana*, Dro Gregorij Rozman. Post salutparolo de Sroj Peter Golobič, prezidanto de la LKK, la juna Mira Vahen deklamis la «Kongressaluto»(n) de Damjan Vahen. Poste ĉarmaj knabinoj el Jenenice kantas kaj ritme figuras la «Espero»(n). Samkredano, kies nomon mi ne konas, prezentas kelkajn slovenajn popolkantojn, post kio Damjan Vahen faras la solenan festparolon kaj disdonas honorajn kongreslegitimilojn.

NATIONAAL KONGRES VOOR ESPERANTO BIJ HET ONDERWIJS.

Toen dit voorjaar bekend werd dat de regering bij de Kamers een nieuw wetsontwerp voor de normaalschoolopleiding zou indienen, heeft het bureau « Esperanto bij het Onderwijs » zich tot de regering gewend om de invoering van Esperanto als leervak op de normaalscholen op een of andere wijze mogelijk te maken. Desnoods facultatief en zonder bezwaar voor 's lands begroting. Bij de behandeling in de afdelingen van de Tweede Kamer hebben verschillende afgevaardigden wenschen in dezen geest geuit, zooals blijkt uit het voorloopig verslag.

Een en ander gaf aan de afgevaardigden van de verschillende Esperanto- en onderwijsers-organisaties, die het bureau « Esperanto bij het Onderwijs » vormen, aanleiding in hun vergadering van 9 September te besluiten, om in den Haag op Zaterdag 5 November een Kongres te beleggen, waar door sprekers van naam en gezag en van verschillende richting werd betoogd, dat de

tijd gekomen is om Esperanto in te voeren bij de normaalschoolopleiding. De katholieke spreker op dit kongres was de bekende hoogleraar van de Rijksuniversiteit te Utrecht, Prof. Dr. Gerlach Royen, O. F. M.

Aan autoriteiten op verschillend gebied, natuurlijk op de eerste plaats onderwijsautoriteiten, werden uitnodigingen gezonden. Zoo nodigde men uit de minister van Onderwijs, de algemeene bestuurder, alle afgevaardigden, de rijksonderwijsraad, de rijksinspektors, de schepenen van de groote steden enz.



POR PURA LINGVA EVOLUO II

ESPERANTO EGALA AL NACIAJ LINGVOJ ?

Ekzistas esperantistoj, kiuj — kompreneble bonintence — ne ĉesas disdiri, ke Esperanto estas ĉiurilate egala al naciaj lingvoj. Dirante tion, ili kredas servi al la lingvo propagandacele, sed en vero iliaj vortoj malbone efikas internen, t.e. sur la kvalito de la lingvo mem.

Sendube Esperanto estas almenaŭ egalva-

LA JUBILEA

Post paŭzo, la knalbinoj el Jesenice prezentas ĉarman popolkanton « Laŭ la Lago »: ilia apero estas vere tro mallonga. Post alparolo de Anton Sterlé, prezidanto de la Slovena Esperantista Asocio, ni ree ĝuas kelkajn popolkantojn, ĉiam simplajn, kelkfoje naivajn, kantatajn de la sama kantisto: ili efikas tre agrable.

Nun ni konatiĝos kun la plej granda slovena poeto, D-ro Francé PREŠEREN, kies monumenton ni jam admiris sur la apuda Marijin Trg (Maria Placo): S-ro Vahen konatigas lian impresan figuron per lumbildparolado, post kio ni aŭkultas lian verkon « *Bapto ĉe Savico* » en la traduko de Damjan Vahen: la recitantoj, Milan Skrbinšek, Damjan kaj Mira Vahen kaj Peter Golobič, sub reĝisorco de la unua, meritas plenan laŭdon pro tiu prezento; ĝi certe estis tre inda supro de la Akademia vespero, kiu finiĝis per speciala dankvorto al Lia Princepiskopa Moŝto kiu eltenis ĝis la fino malgraŭ la sufokiga atmosfero en la salono.

Reirante hejmen, ni ankoraŭ admiris la



Damjan Vahen, sekr. de la LKK, redaktoro de Niaj Vizaĝoj kaj de Verda Revuo.

lora al — eble eĉ pli valora ol — la lingvoj naciaj; sed per ĉiaj ajn argumentoj oni ne kapablas forrezoni la fakton, ke ĝi estas lingvo arte farita kaj ne senbride kaj haose kreskinta.

La artefariteco de Esperanto elmontriĝas diversilate. En la kadro de tiu ĉi artikolo ni priparolu nur unu tian fakton, kiu konstante influas malbone nian literaturan lingvon:

Ni scias, ke pere de Esperanto multaj homoj sukcesas riĉigi la propran menson, akirante en spirita regiono kapablojn, kiujn ili sen Esperanto eble neniam akirus. Ni scias ekzemple, ke ekzistas personoj, kiuj kapablas fari longajn paroladojn en Esperanto, sed ne en sia lingvo nacia. Aliaj verkas aŭ tradukas artikolojn, eĉ librojn en Esperanto (n), sed antaŭ sia esperantistiĝo neniam eĉ nur pensis pri tia agado en la propra lingvo. Ankoraŭ aliaj verkas poemojn en Esperanto, argumentante, ke Esperanto estas lingvo speciale favora al poemfarado, sed en la propra lingvo ili ne sukcesas kuneglui poemeton.

Cu efektive la scio pri Esperanto dotis

tiajn homojn per tiaj talentoj? Ne, ne! Esperanto povas riĉigi la menson, akirigi la spiriton, plibonigi kapablojn, sed ne donacas kvalitojn, tiom malpli talentojn. La kaŭzo de tio, kion oni preskaŭ ĉiutage povas konstati ĉe tiom multaj esperantistoj, ne estas talentoj iliaj, sed — bedaŭrinda kaj maldolĉa vero! — multrilata fuŝado pri la lingvo.

Imagu, ke la rapidlingva parolanto faras sian paroladon anstataŭ en Esperanto en sia propra lingvo, sed kun precize la samaj kvalitoj, bonaj kaj malbonaj! Imagu, ke la lerta tradukemulo donacas al ni libron tradukitan en nia propra lingvo, sed kun precize la samaj stilaj kaj gramatikaj eraroj! Fine imagu! ke la rapidpluma poeto regalas nin per poemoj nialingvaj anstataŭ Esperantaj, sed kun precize la samaj strange disjetitaj vortoj, kvazaŭrimaĵoj, akcentmodifoj k. s. Cu tiuokaze la parolanto, la tradukinto kaj la poeto ne farus sin publike ridindaj?

« Sen ia dubo! » oni respondos al ni, « sed ĝuste en Esperanto tiuj homoj lertigis sin, kaj ĝuste Esperanto estas lingvo speciale taŭga por tia sinlertigado ».

LA JUBILEA

kastelon, imprese iluminitan je nia honoro, kiel ankaŭ aliajn vesperojn de la kongresmajno, kaj per tiu aera bildo finiĝis nia krakplena dimanĉo.

EKSKURSO.


Por kompensi ĝin, la kongresestraro aranĝis lunde tuttagan **aŭtobusekskurson** TRA SLOVENIO; gaja internacia grupo ĝin partoprenis. Ni unue veturis al la fama pilgrimloko de Maria Helpantino en Brezje, dumvoje haltante en **Kranj** kie, post vizito de la preĝejo kaj de la merkato, ni havis de la granda ligna ponto belan elvidon sur la profunda valo de la Kokra. En **Brezje P.** Carolth celebris la S. Meson, kantatan en Esperanto sub gvido de la ĉefaj samkredaninoj; Prof. Erdey predikis pri la amo al la proksimumo. La sanktejo rememorigas Assisi per sia malnova kapeleto, tute ĉirkaŭkonstruita de la nuna preĝejo; tiel la pilgrimantoj ĝin plej povas ĉirkaŭiri, aŭ ili eĉ interne de la kapeleto surgenue ĉirkaŭiras la altaron. Post matenmanĝo ni pluveturis por viziti piede

la akvobruan interrokaĵon de **Vintgar** kiun multaj, kaj ne malplej la Sacerdotaj Moŝtoj, forlasis kontraŭvole ĉar ili tiom ŝatis salti de ŝtono al ŝtono meze de la akvo; traarbare ni repromenis al la aŭtobuso por atingi **Bled**; la kamparo dumvoje montriĝas tre agrable kaj la slovenaj amikoj nomas al ni la montpintojn kiuj vidiĝas ĉirkaŭe, kaj nome la Triglav (Tri Kapoj), la plej alta monto de Jugoslavujo.

Dume kelkaj stomakoj jam alarmkrias pro la viviga aero, sed rapide ili kontentiĝas je alveno. Ni boatveturas sur la lago al la insuleto, rave kronita de ĝia preĝejo; la alta turo vokas nin kvazaŭ per fingrogesto kaj neniun forgesas sonorigi la feliĉsonorileton; plue ni promenadis, eĉ ni vidis la kradon de la reĝa vilao antaŭ ol reveturi al Ljubljana dum la suno sendas siajn lastajn radiojn sur la Triglav kaj fee ŝanĝigas la kolorojn de la ĉielo. Belega tago!

(daŭrigota)

NOMO.



Tamen ne ; en kaj per Esperanto oni povas disvolvi siajn kapablojn kaj talentojn, sed, ne posedante ian talenton, oni ne sukcesas krei ĝin nur per Esperanto, eĉ ne, sciante la lingvon dum tuta vivo. Kiu ne kapablas oratori, verki, traduki aŭ fari poemojn en la propra lingvo, neniam sukcesos fari ion tian en Esperanto, ĉar neniu povas fari ĝi lerta esperantisto, tute ignorante la gepatran lingvon, kiun oni ĉiutage uzadas. Kaj neniu povas evolui en Esperanto, ne iagra de evoluante ankaŭ en sia nacia lingvo. Kaj se efektive oni prezentas al ni verkojn originalajn aŭ tradukitajn kaj poemojn kreitajn de tiaj homoj nespertaj en la gepatraj lingvoj, ni estu certaj, ke en iliaj plumproduktaj svarmas eraroj.

Jen la danĝera diferenco inter Esperanto kaj la lingvoj naciaj : en ĉiu nacia lingvo ĉiu iom instruita homo tuj rimarkas la erarojn, ĉar la fiksataj lingvaj reguloj malpermesas, ke oni peku kontraŭ ili. Kaj se iaokaze ne ordonas regulo, ekzistas ankaŭ kutimoj, postulantaj obeadon. Kontraŭe en Esperanto la eraroj ne tiom facile rimarkiĝas, unue por tio, ke la granda amaso da esperantistoj konsistas ankoraŭ el studentoj ne kapablaj juĝi pri korekteco aŭ erareco ; due, ĉar malgraŭ sia logikeco la Esperantaj lingvaj reguloj estas tiom elastaj kaj lasas ankoraŭ tiom da libero, ke oni povas diversmaniere klarigi al si iajn gramatikaĵojn, pro kio kreskis pri iaj aferoj pli malpli diferencaj personaj opinioj ; kaj trie, pluraj esperantistoj, precipe en la lastaj jaroj, pli malpli ignoras la logikon, enkondukante en la lingvon tiujn ecojn el la gepatraj lingvoj, kiuj aŭ speciale plaĉas al ili, aŭ kiujn ili pro nesufiĉa scio pri Esp. ne kapablas eviti en sia uzado. El ĉio ĉi rezultas grava danĝero minacanta la liberan evoluon de Esperanto, ĉar laŭ tia procedo Esperanto akiras iujn mallogikajn, nekonservencajn kaj komplikitajn ecojn, kiujn iam posedas ĉiuj naciaj lingvoj kune. Se oni efektive volas rigardi Esperanton almenaŭ egalvalora al la naciaj lingvoj, oni ne apliku al ĝi naciajn lingvajn regulojn aŭ kutimojn, nek kiel studento juĝu kvazaŭ spertulo ; sed oni komprenu, ke Esp. devas evolui ne laŭ spiritoj de arbitraj naciaj lingvoj, sed laŭ propra spirito Esperanta !

Nia unua alvoko jam efikas sukcese. Kel-

kaj Esperanto-gazetoj represis ĝin kaj de diversaj kompetentuloj ni ricevis apogon respondon, i.a. de la Direktoro de l' Sekcio por Kontrolo en la Esperantista Akademio.

Ni daŭrige nian agadon, montrante la malbonojn en la uzado de nia literatura lingvo, kun la nura celo : konduki ĝian evoluon en bona direkto. Kiu aprobas nian agadon, bonvolu informi nin pri tio !

Literatura Komitato,
Adreso : G. J. Degenkamp, Rietstraat, 40, Utrecht, Nederlando.

Vidu pri la Literatura Komitato F. K. no 6. (N. d. l. R.)



ESPERANTO KAJ LA SCIENCO.

Internacia lingvo provas atingi almenaŭ la jenajn celojn : ebligi interkonatiĝon inter vojaĝantoj kaj eksterlandaj enloĝantoj ; faciligi korespondadon inter samtakuloj kaj sangustuloj diversnaciaj ; interkomprenigi la partoprenantojn de seriozaj kongresoj kaj novaĵoj. Komprenoble oni ne rajtas malpermesi la uzon de konstruita lingvo por imaga literaturo kaj poezio, sed tiu uzo estas kromcela kaj ne la centra funkcio.

Ĉiu el la celoj menciitaj postulas apartajn kvalitojn en la lingvo. Por internacia konversacio la lingvo devas esti facile prononcbla de la parolanto, kaj facile komprenebla de la aŭdanto. La vortoj ne estu tro longaj aŭ tro malpezaj, ĉar la aŭdanto bezonas tempon por sekvi la fluadon de la parolo. Por skribi leteron al alilandulo, oni estus feliĉa havi simplan regulan ortografion, ĉar oni ne volas perdi tempon serĉante en vortaro. Krome oni volus povi eviti la ceremoniajn formulojn kaj idiotismojn uzatajn en nacilingvaj leteroj. Konversacii kaj korespondadi deziras ĉiu larĝanima homo, kaj la sciencisto estas unualoke homo, kiu ne nur volas legi sian fakliteraturon kaj ĉeesti internaciajn kunvenojn, sed ankaŭ paroli libere pri ĉiutagaj aferoj kaj interŝanĝi amikajn leterojn.

Tamen, estas precipe por konferencoj pri raportoj ke sciencisto bezonas konstruitan lingvon. Mi mem ofte ĉeestis internaciajn kunvenojn, inkluzive tiujn de faklingvistoj kaj fonetikistoj kaj ofte ĝemis, kiam miaj

oreloj turmentigis kaj mia cerbo laciĝis pro la misprononco kaj misuzo de mia gepatra lingvo. Tre granda danĝero estas tiu de tiel-nomataj, « internaciaj » vortoj, kiuj havas aŭ diversajn formojn (« senkonsciencia » — fr. *inconscient*, angl. *unconscious* ; « premo » — fr. *pression*, angl. *pressure*) aŭ diversajn funkciojn (fr. *conscience* — Esp. *konscio*, *konscienco* ; fr. *unité* — Esp. *unueco*, *unuo*).

Ofte en anglaj recenzoj verkitaj de alilingvaj fakuloj oni povas submarki la influon de la fremda lingvo. Tiaj diversecoj pruveblas ke preferinde la internacia lingvo devas esti sufiĉe *aŭtonoma* kaj stari sur siaj propraj piedoj, t.e. siaj propraj sisteme ellaboritaj vortdefinoj, laj super ĉio ne troligiĝi kaj kateniĝi al nacilingvaj ŝablonoj. La Plena Vortaro kaj lastatempe la Oficiala Listo de vortoj kun difinoj provizas por Esperanto bonan bazon. Por la superstrukturo de fakterminoj Esperanto povas laŭ la fundamenta regularo ĉerpi ankoraŭ pli ol nuntempe el la internacia vorttrezoro kaj trovi sinonimojn de kelkaj pezaj vortoj, ekzemple « prizono » « impedi », « evento », simile kiel ni jam nun uzas « trajno ». Por kelkaj natursciencoj kiaj la botaniko, zoologio, anatomio kaj fiziologio oni povus allasi la uzon de la latinaj esprimoj senŝange, ekz. : *Taraxacum Dens-leonis*, *Ornithorhynchus*, *occiput*, *cerebellum*, en la internacia ortografio. La matematikisto havas sian simbolaron, la muzikisto sian notaron, kaj la kemiisto sian formularon. En la lingvoscienco ni povus uzi ankaŭ la latinajn aŭ grekajn formojn, ekz. « *essivus* », « *praesens historicum* », « *pluralia tantum* », ktp.

Universitata kolego, kies fako estas la botaniko, foje diris al mi ke la malfacilaĵo por la sciencisto ne konsistas en la terminaro, sed en la gramatiko kaj konstruiloj, la « cemento » por kunigi la blokojn de fakesprimoj. Kiel tia cemento Esperanto bone taŭgas, ĉar ĝi estas : 1) pli simpla, 2) pli preciza, 3) pli libera kaj 4) malpli konvencia ol ĉiu ajn nacia lingvo. Krome, ĝi jam havas — aŭ povas evoluigi el sia propra heredaĵo — la elementojn uzotajn por pliriĝi sian vortaron laŭ la ĉian kreskantaj bezonoj de scienca esplorado. (*el Heroldo*).

Draag altijd het officieel insigne van I. K. U. E. (4 fr.)

VRAAGT EN LEERT

No. 21. Kath. E-Klub Ste-Mariaburg. —

Bij het lezen van het artikel « Toleremo » konden wij de woorden « suloj » en « suleco » niet vinden. Is het een nieuw woord misschien ?

Antw. — Sulo is te vinden in het zeer goede zakwoordenboekje van Schidlof. Het is dus geen nieuw woord. Het beteekent : baszangans, Jan-van-Gent genoemd, een rotspelikaan die vooral voorkomt op het eiland Bass in Schotland, en bij stormachtig weer wel eens op onze kusten komt. Daar gans figuurlijk beteekent : dom, onnoozel, (men zegt b.v. zoo dom als een gans, met iemand de gans rijden) en daar tegelijkertijd dit Esperantowoord dezelfde stam bezit als het Nederlandsche woord « sul » (domme, onnoozele vent) was dit woord hier eenigzins op zijn plaats, daar het moest beteekenen : domme, onnoozele menschen, snullen.

Doch om bij vergissing geen nieuw woord in te voeren, of liever, om aan een bestaand woord geen nieuwe beteekenis te geven, beschouwe men het liever als een fout en leze er voor in de plaats : naiveguloj, malsprituloj, simplaĉuloj, stultuloj en resp. -eco.

POR NIA FLAGO.

Dua listo :

M. Truyens, St. Niklaas	10.00 fr.
C. v. H., Grimbergen	10.00 fr.
Por la kruco en la stelo J.V.D.	10.00 fr.
Propagandas la propagandestro J. D.	10.00 fr.
El Bona-Erikejo Kap. V. G.	20.00 fr.
Por ke FUKU kresku en Geeraardsbergen C. B.	20.00 fr.

Antaŭa sumo 115.00 fr.

Entute 195.00 fr.

◆ Parolas La Leganto ◆

Oogen open!

Vele katholieke esperantisten loopen hoog op met toenadering en vrede. Deze gedachten zijn natuurlijk verre van slecht als men in zijn daden de maat weet te houden. Maar velen onder hen «verbroederen» met alles en iedereen en ze voelen zich overal thuis, zelfs daar waar ze niet thuis hooren. Zoo zien we thans regelmatig hoe katholieke esperantisten op goeden voet omgaan met de vijanden van ons geloof en ons volk. Zulke handelwijze is totaal verkeerd en dat ze hun ongelijk niet inzien is wel het ergste van al want dit bewijst reeds hun geestelijke afglijding. Jawel, we kennen en we hooren hunne uitvluchten... het is maar om zich op de hoogte te stellen,..... om de methodes van die menschen na te gaan,..... als pacifisten moeten ze toch met iedereen in goede verstandhouding leven,..... en zoo kunnen ze al eens een katholieke stem laten hooren in middens waar ze anders nooit zou weerklinken. Bijzonder dit laatste moet den doorslag geven! Hoe dwaas! Denken ze dan waarlijk dat hun aanwezigheid in zulk gezelschap maar één oogmerk en de belangen der «anderen» inging? Voelen ze dan niet dat ze daar niets anders zijn dan volatiele wolven, welke, voor de reeds bijziende wereld, Lenin's slagwoord: «Godsdienst is opium voor het volk» heelmaal moeten verdoezelen en dat ze gewoonweg verraad plegen met den schijn te verwekken alsof het katholicisme niet onvereenigbaar is met deze machten? Machten die we best kunnen vergelijken met schadelijke of juist doodelijke drankjes en welke de Kerk, ten gerieve van ons, met het bekende waarschuwend etiket voorzien heeft dat we op alle fleeschjes met verdachte inhoud aantreffen. Welnu, om in dezelfde beeldspraak voort te gaan, sommige katholieken zijn ook etiketten, maar bedrieglijke, die zich over de oorspronkelijke laten heen plakken en aldus ontelbare geloofsgenooten den geestelijken dood injagen. Dooden in plaats van te redden, dat is het eenige resultaat! Bijgevolg als ze het werkelijk goed meenen met het missionaat dat ze zich tot doel hebben gesteld: onzen gods-

dienst door Esperanto te dienen, dan is hunne plaats in onze rangen en daár alleen.

Katholieke Esperantisten!

Communisme, liberalisme, vrijmetselarij en al wat schermt met de door zes pausen veroordeelde basis van de democratie, de fameuse «Rechten van den Mensch» is ons vertrouwen niet waard, ook niet onze goedwillige neutraliteit uit verkeerd begrepen pacifisme en zeker niet onze vriendschap. — Daartegenover past alleen een nooit verslapende strijdvaardigheid. Tusschen ons geloof en de machten der duisternis kan er nooit een vergelijk komen want het eene is des duivels en het andere is van God en fussen beiden staat voor eeuwig de onwankelbare muur van duizenden lijken onzer martelaren. En nu moogt ge het schoon vinden of wat ook, dat de Fransche leider der communisten, Maurice Thorez, met Kerstmis de Middernachtmis te Baux heeft bijgewoond, wij vinden dit doodgevoorn een weerzinwekkend bedrog en vragen Uwe meening over een ander feit, het feit dat er thans reeds voor «katholieke» volksfronters kerstkribbekens vervaardigd worden waar het Jezus-kind door de herders met de gebalde vuist wordt begroet. Of zegt U dat niets?

Katholieken breekt af met zulke «broederlijkheid» en wordt weerbaar. Niet omdat wij het vragen maar wel om uit gehoorzaamheid gevolg te geven aan de dringende vermaning van een Stedehouder van J. K., Pius X: «Zet geen voet in het kamp van den vijand» Gij, katholieke Esperantisten, die nog bij den vijand staat met lofwaaardige bedoelingen, overtuigt er U goed van dat ge daar niet uw geloof noch uw volk dient, maar dat men zich daar van U bedient om dat geloof en dat volk te vernielen..... Men kan geen twee heeren dienen!

H. P.

Alles hangt inderdaad af van de manier van «verbroederen». We moeten alle menschen als onze broeders behandelen, maar zoo dat we niet hun verkeerde beginselen of handelwijze steunen. Dit laatste doen echter veel waangeleerden, die door een verkeerd begrepen verbroedering, ondanks hun goede wil, het kwaad steunen en zelf verkeerd beïnvloed worden. *Samenwerking* met de anderen geschiedt daarom niet individueel maar gezamenlijk als organisatie. (R.)



APERIS:

La Infanoj de Betlehem,

de Selma Lagerlöf. El la sveda lingvo tradukis Oscar Frode. Eldonis: Eld. Soc. Esper. en Stockholm. Bela eldono, 32 paĝoj, broŝ. Plaĉa koverto. Prezo: 5.50 fr. (V†)

Ni ĉiuj konas tiun kortuŝan rakonton de la fama sveda verkistino, kiu el sia vojaĝo al la Sankta Lando ĉerpis la materialon por verki plurajn belajn legendojn kaj rakontojn.

La infano Jezuo ludanta en la lilikampo, la mortigado de la infanoj de Betlehem, la forkuro de la Dipatrino portanta sub sia antaŭtuko la Infanon, kiu sub la malfidemaj okuloj de la gardostaranta soldato aspektas kiel lilibukedo, la fina konvertiĝo de la soldato, jen la tuta rakonto, sed farita de unu el la plej eminentaj verkistinoj de nia jarcento. Bonega traduko, malmultaj prezeraroj, pliriĉigo de nia katolika Esperantoliteraturo.

Colo.

Plena Gramatiko de Esperanto,

de Dro K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Dua tralaborita eldono kun detala komentario pri Vorto kaj Frazo. Formato 20 x 13.50 cm. 490 paĝoj. Prezo: 84 fr. broŝ, kaj 105 fr. bindita. Eldono de Literatura Mondo, Budapeŝt. (V)

Car ni timas ke la tralegado de 490 paĝa libro postulos tro da tempo por ĝustatempe havigi recenzon al niaj kursgvidantoj kaj progresintaj lernantoj, ni jam atentigas ilin ke ni povas liveri al ili la libron PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO kiu, laŭ unua trafolumado, ŝajnas al ni tiel grava por la leksikologio.

Ni ne aprobas senrezerve ĉiujn proponojn de la eminentaj aŭtoroj, sed admiras la momentan verkon, kiu estos en la estonteco gvidilo por ĉiu Esperantisto en la mondo.

Ni baldaŭ pri ĝi reparolos pli detale, sed jam nun, antaŭ la vintrokursoj, rekomendas ĝian acetan al niaj kursgvidantoj.

Colo.

La Strato de la fiŝanta Kato,

de Jolanta Földes. Tradukis L. Halka kaj L. Spierer el la hungara lingvo. 268 paĝoj,

broŝ. 32.50 fr.; bindita 40 fr. Eldono de Literatura Mondo. (III. N)

La mondifama romanon pri la fiŝanta kato mi legis kaj mi aŭskultis la intiman rakonton de la aŭtorino, kiu verŝajne travivis multon el la rakonto, kaj mia impresio estis malgaja. Sendube tio estis la celo de la aŭtorino: ŝi priskribas la grizan vivon de enmigrantoj venintaj el Hungarujo, Rusujo, Germanujo, Italujo, kaj enloĝintaj en Parizo, en Strato de la fiŝanta kato. «Ĉu ekzistas lando, kie ĉiu burĝo povas esti hejme en la sama tempo?» demandas al si Annuŝ, la hungara knabino. Ne en Italujo post la alveno de Mussolini, ne en Rusujo depost 1917, ne en Germanujo post la alveno de Hitler, ne en Hispanujo. Ĉion ĉi J. Földes montras al ni per tipaj ekzemploj, kiuj mizere koincidas en la strato de la fiŝanta kato. Si speciale pentras la nigran materialistan flankon de la vivo; ni ne simpatias tiujn Barabas, Ljiv, Fedor, ĉar ili agas kiel bestoj, aŭ pli ĝuste, la aŭtorino ne kapablis montri al ni, ke krom korpaj kaj distraj bezonoj, ili posedas ankaŭ animajn aspirilojn. Nur iliajn diversajn teoriojn ŝi de tempo al tempo aŭdigas al ni dum la diskutado en la «bistro». Emociiga estas la priskribo pri la enterigo de la Ruso Vasja, sed ja ankaŭ tie la aŭtorino ne kapablis sin levi pli alten ol ĝis nivelo de hundoj, kiuj ankaŭ hurlas kiam kunhundoj aŭ idoj mortas.

Por katolikoj do, kaj ankaŭ por alireliguloj, la libro ne donos plenan kontentigon, literature ĝi estas altnivela, la Esperantotraduko estas laŭstila bonega, nur tro da neologismoj malfaciligos la legadon al ne-latinaj legantoj. Prezeraroj estas ie kaj tie troveblaj.

Interesa por studadi la malgrandstratan Parizan vivon, tieajn ideojn kaj personojn, sed la impresio estas senesperiga kaj, laŭ mi, vera literaturo devas alporti al ni ion belan, ion esperigan, eĉ kiam oni pentras la malhelajn flankojn de la nuntempa civilizacio.

Surdmutuloj pri si mem,

de Włostowski kaj Dobrowolski. Prezo: fr. 6.50. Eldonis Süsskind Schönberg, la tradukinto. (V)

Jen verketo, 48 paĝa, pri la tiel miskonataj surdmutuloj, verkita de surdmutuloj kaj tradukita de surdmutulo, verketo kiu vibras

de emocio kaj kompato pri la malfeliĉa sorto de tiuj viktimoj de la socio aŭ malsano, kaj al kiuj ni tamen povus alporti ĝojon, helpon kaj sunradion, se ni pli bone konus ilian situacion kaj veran kariton. Legu tiun libreton kaj vi vidus kiajn mirindajn rezultojn povas akiri racia edukado de la surdmutuloj.

Colo.

Radio-programmo de Romo. Novembro.

Senpage havebla ĉe Esperanto Voĉo, Radio-Studio, Via Montello 5, Roma, Italujo.

Estas vere ĝojiga iniciato de la E. I. A. R. eldoni specialan programon monatan de la radioelsendoj de Roma 2 RO kaj Roma II en la lingvo Esperanto, kaj decas ke ni montru interesigon, ĉar vere la koncernaj programoj estas tre interesaj, ne nur en Esperanto, ĉiusabate de la 19.01 ĝis la 19.18, sed ankaŭ en multaj diversaj konataj lingvoj. *Se multaj Esperantistoj sin anoncas, oni ankaŭ organizos elementan kurson pri la itala lingvo en Esperanto.* La interesuloj skribu al Radio Turismo, Esperantofako, Via Vittorio Veneto 62, Roma, Italujo.

Colo.

La Turo pri honoro al la flandra herooj.

Broŝuro eldonita de kaj senpage havebla ĉe la sekretario de la Izerpelgrimado, Diksmuide, Maria Doolaeghestr. 39.

Tiu ĉi belaspekta 16 paĝa ilustrita libreto priskribas al kio la Izerturo dankas sian ekziston kaj kio estas ĝia simbola signifo. Ĝi montras kiel la flandra popolo estis subpremata kaj la flandra konsciigo okazis precipe en la tranĉeoj. Petu la libreton kaj sendu ĝin al eksterlando por honorigi ankaŭ tie la flandrajn heroojn.

C. v. H.

Diksmuide,

16 paĝa riĉe ilustrita faldprospekto pri Diksmuide. Ĝi estas en kvin lingvoj, el kiuj Esperanto okupas la duan lokon. Senpage havebla ĉe supre menciata adreso.

UITGAVEN "DIE POORTE" 1938.

N^o 1) Twaalf Stoelen,

door Ilf en Petrow, 306 bladz. prachtige omslag, keurig papier.

Deze twee grootmeesters der hedendaag-

sche Russische satire, schenken ons hier een letterkundig-hoogstaande brok leutige, leerrijke en hekelende geschiedenis over de huidige toestand in hun land, en met spanning volgen wij Ostap Bender en Worobjew op zoek naar de twaalf stoelen waarvan één het onmetelijk fortuin van Worobjew's schoonmoeder inhouden moet. Bij het lezen van « De Witte » moesten we destijds luidop lachen, ook de Twaalf Stoelen zullen ons doen lachen en — typisch voor de Russische mentaliteit — ze zullen ons doen griezelen ook!

L. C.

N^o 2) Valerius de Saedeleer & Zuid-Vlaanderen,

door Andre De Ridder. Prachtuitgave op luxe-papier, monographie met 12 phototypies van den gekenden Vlaamschen Meester.

Alhoewel we niet onvoorwaardelijk de bewondering van den — trouwens objektieven — schrijver deelen in zake kunstopvatting van de Saedeleer, waar schrijver toch zelf getuigt dat de werken « meestal fotografisch juiste tafereelen zijn » en met hem beamen dat de Saedeleer ons « het meest volledige, synthetische, verheven en objektieve BEELD van ons land geschonken heeft » voor mij moet een schilderij nog wat meer zijn dan een beeld of een foto), zijn we hem dankbaar voor de hulp om de Saedeleer's bedrevenheid in zijn « anatomie van de boomen » te leeren kennen. Een flinke aanwinst in onze artistieke letterkunde.

L. C.

De boeken van "Die Poorte" kosten, met de reeks van 8 genomen, 10 fr. per stuk; afzonderlijk genomen 16 fr. Bestelling en prospectus bij L. Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. Postrek. 209034.

VOOR UWE

**Parketvloeren, Linoleums,
Meubelen en Marmers
VRAAGT DE ALOMGEEKENDE
BOENWAS GLIMO**

Firma Corstiaens - Neefs
St-Antoniussstraat, 12-14, Antwerpen



Esperanto-kursussen. FUKU organiseert dit seizoen in verschillende plaatsen een Esperanto-kursus. Indien er nog leden zijn die bereid zijn een cursus te geven in hun omgeving, gelieven deze zich op te geven bij het bestuur en eventuele hulp te vragen.

Bestuursvergadering. Op het einde van November of in het begin December zal er een bestuursvergadering plaats hebben te Antwerpen. Personen die voorstellen ter bespreking verlangen in te dienen, gelieven dit tijdig te doen.

NOVAJ FUKU-GRUPOJ. — Ni ĝoje bonvenigas du novajn FUKU-grupojn, unu en Rumbeke kiu nomiĝas « *Paca Batalo* », kaj pri kiu ni esperas ke ĝi pace batalos por nia bela katolika Esperantoideal. La dua grupo estas la vigla grupo « *La Arbaramikoj* » en Buggenhout, kiu voĉdonis pri aliĝo al FUKU jes aŭ ne, kaj kies anoj ĉiuj voĉdonis por aliĝo, kio pravas ke ili estas vere katolikaj Esperantistoj. Ni dankas la prezidantojn de tiuj grupoj pro ilia bela ekzempla laboro.

LA LOVENA KRUCO. — La geanoj de nia sekcio regule kunvenis ĉiulunde de post la fondiĝo kaj, krom ekzercoj diversaj dum la kunvenoj, faris promenadojn bicikle kaj piede.

La sekcio donas en sia ejo, Sociale Werken (Lovanium), Vaartstraat, semajnan kurson kiu komencis jaŭdon, la 20-an de Oktobro, je la 20a kaj okazas nun ĉiun mardon kun pli ol 30 lernantoj. Ni firme kaj plenfide marŝas antaŭen. La estraro konsistas el: Prezidanto: Dro Marcel Naster, Sekretario: Dro Petro De Fraye, Kasistino: Sino Leo Meurrens - Elaerts.

KUNVENO S. I. K. 19-9-1938. — La ĉeesto de la unua kunveno post la granda libertempo ne estis granda. Pluraj membroj forrestis pro la malfermo de la klasoj tiun tagon. Post preĝo kaj bonvenvorto de la Prezidanto, la sekretariino laŭtlegis la raporton kiu estis aprobata.

S-ro Van Deun parolis pri la granda novaĵo: organizo de la KUE-kongreso 1939 en Antverpeno. Li faris malgrandan historion de la unuaj paŝoj, laŭtlegis leteron de S-ro Heilker, Prez. de IKUE kaj petis la helpon de la klubo. Ses anoj sin prezentis kaj S-ro Van Deun ilin dankis nome de FUKU. Li klopodos tuj eklabori interkonsente kun la estraro de FUKU.

La Prezidanto proponis abonon al *Espero* Katolika kaj la Praktiko. Tiuj revuoj rindiros inter la geanoj. Li denove priatentis la anojn pri la devo aliĝi al FUKU, kaj proponas ke sekvantan kunvenon ni faros komunan liston por la tuta klubo.

Post kiuj seriozaj preparoladoj, la kanto « Kiu jen aŭdigas sin » gaje sonis en la salono.

La konversacio pri la manĝaĵo ofte ridigis nin, sed samtempe lernis al ni aron da novaj vortoj.

La legado de humoraĵoj konis grandan sukceson.

Komuniko de la rezultoj de la antaŭa konkurso, transdono de la libertempa konkurso kaj disdono de la nova.

La kunveno finiĝis per frazludo, komuna ludo kiu eksonigis gajajn ridojn pro la ofte sprita kaj neatendita respondo donita per la kartoj.

La kunveno disiris post la kanto de la himno *Espero*, adiaŭa vorto de la prezidanto kaj preĝo.

GELA ESPERANTO GRUPO.

La 3an de Septembro G. E. G. kunvenis. Mirinda estis la granda nombro de ĉeestantoj. Kaŭze de foresto de nia Prezidanto, la vicprezidanto malfermis la kunvenon per la preĝo.

Sinjoro Van Gorp pritraktis la utilecon kaj gravecon de nia Esperanta lingvo. Ĉiuj niaj membroj atenteme aŭskultis! ? kaj kompreneble, ĝi estis flandringva kion la parolanto parolis. Tamen la sukceso estis pli granda, tiun ĉi fojon ĉiuj anoj estis kon-

vinkitaj, kaj do ili serioze promesis : ke oni kune kaj kuraĝe trastudos la lingvon. La sekretariino prelegis la raporton de la lasta kunveno kaj de nia ekskurso al Arendonk. Poste Sinjoro Gordon ludis per saksofono elektajon de « Desert song » (kanto de la dezerto) de Romberg. La saksofonludo ege kontentigis la aŭdantojn, ĉar muziko agrabligas la kunvenojn. Poste oni faris Esperantlingve kelkajn konversaciojn kaj kantis kelkajn novajn kantojn. M. G.

ESPERANTO-KURSOJ. — En Antverpeno ni organizas tri kursojn en kunlaborado de Aktie-komiteit der Parochiale Scholen.

La daŭriga kurso, gvidata de nia Prezidanto, kies kurso spertis tiom da sukceso pasintan jaron, okazas ĉiun jaŭdon je la 7½a en Kerkstraat 157.

La kurso por komencantoj, gvidata de F-ino M. De Rop, okazas en sama ejo, ankaŭ je la sepa.

La kurso por komencantoj, gvidata de S-ro G. Van den Bergh okazas en Grootte Kauenberg je la sama horo.

Tiuj tri kursoj estas senpagaj.

En Ste Mariaburg en la knaba lernejo, S-ro Joz. Cammaert, Van de Weyngaerts, 12 ; malfermis kurson la 21-an de Oktobro, je la oka.

Por la I. K. U. E. kongreso ni esperas je niaj anoj de Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵoj ekspluatos tiujn okazojn, kiuj samgrade helpas niajn esperantistojn kaj komencantojn.

KONKURSOJ. — Ni denove priatentas niajn anojn je la nova rubriko kaj instigas ilin multnombre partopreni al niaj enigkonkursoj. Estas sen ia risko por ili kaj ni forlotumos ĉiun monaton valoran libron.

Vergeet niet een premie te verdienen door het aanwerven van nieuwe leden !

NIA FLAGO. — Organizante la IKUE kongreson ĉiu membro komprenos ke ni je tiu tempo nepre bezonas flagon. Ĉiu almenaŭ sendu frankon por ebligi al ni ĝin aĉeti. La donacojn oni sendu al P. C. N° 412.354 de KVEV Aalst aŭ al N° 137.438 de J. Van Deun, Borgerhout, Dankon.

Berichten van het Verkoopsinstituut

Volgende zeer interessante boeken kunnen wij ten zeerste aanbevelen :

Fundamenta Krestomatio, D-ro Zamenhof	Fr. 18.—
Lingvaj respondoj, D-ro Zamenhof	Fr. 7.50
Proverbaro Esperanta, D-ro Zamenhof	Fr. 7.50
Verda Koro, Julio Baghy, zeer eenvoudig	Fr. 16.50
ELLERNU, daŭriga kurso de Esperanto	Fr. 16.—
Leerboek voor Esperanto, Dr. F. Szilagy	Fr. 11.—
La Tuta Esperanto, H. Seppik	Fr. 24.—
El diversaj lingvoj	Fr. 20.—
La Leono de Flandrujo, Conscience	Fr. 24.—
La vagabondo kantas, J. Baghy	Fr. 16.—
Verdaj Donkijotoj, J. Baghy	Fr. 16.—
Infanoj en Torento, Stellan Engholm	Fr. 13.—
Strato Fiŝanta kato, J. Földes	Fr. 30.—
Auli, Hendrik Adamson	Fr. 11.—

Bestel ze onmiddellijk op ons Verkoopinstituut, 14, Egied Segerslaan, te Wilrijk.

— **Geen verzendingskosten meer.** —

Ĉiu Esperantisto nepre devas posedi la plej interesan verkon aperinta en ESPERANTUJO ekde ĝia naskiĝo, nome **PLENA VORRARO** ; klarigo de ĉiu vorto en Esperanto, kompilita de Grosjean-Maupin, Esselin, Grenkamp, Waringhien.

Por kompreni la veran sencon de Esperanta vorto, vi devas konsulti tiun verkon. Tial, mi konsilas al vi, mendu ĝin nun, ĉar ĝia prezo multe malaltiĝis.

Bindita : Bfr. 70.—, afrankite.

Mendu ĝin ankoraŭ nun. Adreso : Vendinstituto.

RADIO LOKSBERGEN.

We vestigen er de aandacht op dat onze Esperanto-kursus plaats heeft elken Zaterdag van 16.30 u. tot 16.45 u. Om te toonen dat de wekelijksche Esperanto-uitzending gewaardeerd wordt, gelieven al onze lezers een dankwoordje te schrijven aan Vlaamsche Radio-omroep, Turnhoutsche baan 27, Diest.

KION ALIAJ SKRIBAS ?

LINGVA AUXILIAR. — Gazeto el Brazilo en Portugala kaj Esperanta lingvoj. Ni trovis en numero 30 artikolon : « Kio estas Socio ? » La artikolo enhavas veraĵojn sed ankaŭ sensencaĵojn. Ekzemple ni legas ke « la libervolo estas fantazio de niaj prapatroj », kaj « La sociologio devas esti nia biblio, nia gvidilo ». Ankaŭ oni parolas pri « moralo ». Kiaj malaĵoj ! Ni ne estas libervolaj, sed tamen ni povas, laŭ verkinto, misfari, ĉar ekzistas moralo kaj oni devas elekti la sociologion kiel nian biblion kaj *gvidilon*. Kiel eble estas *devi* kaj *gvidigi* sin per sociologio aŭ biblio se ni ne havas liberan volon ? *Devo* estigas respondecon sed se ni ne estas liberaj ni ne povas esti respondecaj pri niaj agoj. Do, se la verkinto volas esti logika, li ne atentu sociologion aŭ iun devon, ĉar li tamen ne estas libera sekvi ilin.

Esperantistoj ne plu propagandu Esperanton ĉar la homoj ne estas liberaj, kaj do ili tamen lernas aŭ tamen ne lernas Esperanton, kion ajn vi faras ; sed kial mi konsilustion al vi, ĉar vi tamen propagandas aŭ ne propagandas, kion ajn mi diras, ĉar ankaŭ vi ne estas libervolaj.

Vere estas ke la homoj ne estas liberaj rilate al kelkaj el siaj agoj kaj do ankaŭ ne estas respondecaj pri ĉiuj faroj, sed tio ne pruvas ke la libera volo entute ne ekzistas. Tiun liberan volon sentas ĉiu prudenta homo.

Ni povas bone pardoni al la verkisto tiujn stultajojn se li vere pensas ke li ne estas libera kaj kompatas lin, bedaŭrante ke tiaj idealistoj ne konas la veron.

U bent vergeetachtig. Betaal daarom aanschonds uw bijdrage voor het nieuwe jaar !

El la FUKÉ-familio.

En la familio de nia kara delegito de Gento, S-ro De Valck - Van den Hende, naskiĝis filineto, kiu ĉe la Bapto ricevis la nomon Magda. Ni kore gratulas la feliĉajn gepatrojn kaj diras bonvenon al Magda.

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

kun detala komentario pri vorto kaj frazo.

— II-a tralaborita eldono. —

Verkis : Kolomano Kalocsay - G. Waringhien.

La verko donas al vi konsilon ★
pri ĉiuj problemoj de lingvo-uzo.

Nepre necesa konsultlibro por ĉiu ★
kursgvidanto, lingvo-studento k.t.p.

Formato : 16 x 33 cm., 490 paĝoj

PREZO : broŝurita : Fr. 84,—

bindita : Fr. 105,—

Eldonis LITERATURA MONDO, Budapest XI
Soroksari-utca, 38.

Mendu ĉe nia Vendinstituto,

14, Eg. Segerslaan, Wilrijk.

NI NE PLU POSTULAS SENDKOSTOJN

MENDU ĜIN TUJ - TUJ - TUJ.

REDAKLIA LETERKESTO

C. F. en Groesbeek (Nederl.)

Via artikolo pri bildigo de personoj per la voĉo, aperos en la « Disfrá Paĝo » Dankon.

Via propono regule en la Redakcia Leterkesto informi ĉu ensendita artikolo taŭgas aŭ ne, estas tre bona kaj ordinara agadmannero. Sed ni ne povas aprobi vian proponon interkonsenti ke artikolo kiun oni sendas al unu gazeto ne aperu aliloke, ĉar kelkaj artikoloj estas tiel valoraj, ke ili meritast lokon en ĉiuj gazetoj. Vi ŝajne supozas ke ĉiuj Esperantistoj abonas diversajn gazetojn. Sed tion nur faras tre malgranda parto.

D I S T R A P A Ĝ O

NIA ENIGMORUBRIKO

Por plenumi la deziron de multaj anoj ni malfermas konkursan rubrikon. Ni komencos per unu konkurso monate.

Nia celo estas ke nia anaro havu interesan okazon por sin ekzerci je la lingvo kaj esperas ke ili multnombre partoprenos.

REGULOJ

- 1° Ĉiuj niaj anoj rajtas partopreni.
- 2° La solvojn oni sendu en fermita koverto al: J. Van Deun - Jespers, Turnhout-schebaan 277, Borgerhout.
- 3° Oni aldonu poŝtmarkon de 75 ct. por iomete kovri niajn elspezojn.
- 4° Inter la solvintoj kaj por ĉiu konkurso ni forlotumos unu aŭ plurajn valorajn librojn.
- 5° Ensendoj, ne konformaj al la reguloj ne valoros.

SILABENIGMO N° 1

Provu formi 19 du-silabajn kaj kvin-literajn vortojn el la tridek ok ĉi subaj silaboj.

La mezaj literoj kaŝas gravan veron.

boĝ — ce — cit — dro — dro — eta —
fas — fi — gre — gro — ii — io — io
— ka — kas — ko — ko — kon — kop —
log — meo — mio — mo — neo — ni —
no — no — pa — po — pra — re — ro
— to — ti — to — tra — vos — vuo. (38)

VORTKLARIGO

1. Facile farebla, kvankam ne ĉiam honesta.
2. Pli bone ol blinda.
3. Kion ĉiu kato havas.
4. Muzikinstrumento.
5. Kiun oni trovas en Libanono.
6. Okazas en la akvo.
7. Ŝatata juvelo.
8. Tuŝi per pafita sago.
9. Kie plenumiĝas sekreta agado.
10. Moderna reklamilo.
11. Legaĵo.
12. Pandona kreskaĵo.
13. Trovebla ĉe marbordo.

14. Parto de marŝado.
15. Pentofaraĵo.
16. Kapkovrilo.
17. Anstataŭas ponton.
18. Nepre necesa ĉe kurbo.
19. Naturvidindaĵo.

La solvojn ni akceptas ĝis la 13a de Decembro.

Premio por enigmo 1: *Vortaro J. Van Straaten*. (Valoro 40 fr.) forlotumota se estas pluraj bonaj solvintoj.

GRAVA RIMARKO:

Ĉiuj vortoj de la enigmo estas troveblaj en *Vortaro J. Van Straaten*.

Ni priatentos niajn anojn pri la fakto ke ni intencas ĉiun monaton premi niajn konkursojn per bela, interesa kaj valoro libro, eble pluraj

SE

la partoprenantaro estas sufiĉe granda.

Ni speciale instigas niajn grupojn ekspluati tiun rubrikon kaj ĝin uzi kiel komunan laboron dum la kunvenoj. La ebla gajno de la libro(j) riĉigas la kluban bibliotekon.

HUMURAĴOJ

Instruisto. — Oni povas nur samspecajn aferojn sumigi. Ekzemple, unu seĝo kaj unu seĝo estas du seĝoj, sed unu ĉevalo kaj unu azeno ne estas du ĉevaloj aŭ du azenoj.

Lernanto. — Tamen, majstro, kiam nia patrino aldonas unu literon da akvo al kvin literoj da lakto, ŝi havas 6 literojn da lakto.

BONKORA INFANO

Manĝo ĵus ĝuis sian tagmanĝon. Si jam malplenigis poteton da fragoj kaj volas komenci duan poteton, kiam ŝia onklino dolĉe malhelpas ŝin dirante: vi scias ke unu poteto estas por mi, ĉu?

Manĝo, iom hezitinte, subite respondas: estas domaĝe, onklino, sed estis hazarde via poteto per kiu mi komencis, kaj tiam trankvile ekkaptas la duan, sian poteton.

Wilt ge steeds veel volk op uw vergaderingen? — Geef een uurtje FILM!

Het Katholiek Smallfilm Studio van Antwerpen biedt U een interessante keuze van documentair- speel- en tekenfilms.

Specialiteit van reportages: 17e IJzerbedevaart, VI. Nat. Zangfeesten, Pater Damiaanfeesten enz. Meer dan 600 referenties.

Vraag gratis uitgebreide geïllustreerde kataloog aan:

KATH. SMALFILM STUDIO, 32, OUDE BEURS, ANTWERPEN

La plej rekomendindaj originalaj verkoj en Esperanto

estas la verkoj de la plej populara esperantisto-verkisto:

JULIO BAGHY.

Ĉu por distro, ĉu por studo, ĉu por ekzameno, tutegale, liajn verkojn vi legu!

Jen la titoloj kaj prezoj:

	Bind.	Broŝ.
Preter la Vivo ...	Fr. 24.—	Fr. 17.—
Sur sanga tero ...	Fr. 58.—	Fr. 45.—
Verdaj donkiĥotoj	Fr. 34.—	Fr. 24.—
La vagabondo kantatas	Fr. 26.—	Fr. 16.—
La Verda Koro ...	Fr. 36.—	Fr. 16.50
Printempo en la aŭtuno	Fr. —.—	Fr. 12.—
Teatra Korbo	Fr. —.—	Fr. 13.—
Aliaj tre rekomendindaj libroj estas:		
Leerboek voor Esperanto, de D-ro F. Szilagyi	Fr. 11.—	
Ellernu, daŭriga kurso, de D-ro F. Szilagyi	Fr. 16.—	
Plena Gramatiko de Esperanto, de K. Kalocsay ...	Fr. 84.—	
Haveblaj ĉe nia Vendinstituto, D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝtekkonto No 1194.82.		

ĈIU ESPERANTISTO

nepre havigu al si la plej bonan verkon de nia fama verkistino

1°) MARIE KOENEN, el la ned. lingvo trad. de P. CH. M. v. d. Vijver: *La Sunkrono*. prezo: belgaj frankoj 13. — broŝ.; fr. 25. — bind.

El recenzoj: ... Maar als je eens goed Esperanto wilt lezen, dan kan ik je dit boek aanbevelen... (De Jonge Wacht). ... Bela nova libro kiu entenas bonege tradukitan rakonton..... (La Praktiko). ... La Sun-

Senpage!

vi ricevos senpage je la valoro de 15 fr. bonajn poŝtmarkojn de 15 diversaj landoj (laŭ la plej lasta katalogo de Yvert) se vi abonas la

REVUO INTERNACIA

de poŝtmarkinterŝanĝo kaj Turismo



Ĝi aperas 8-foje ĉiujare, 20 - 30-paĝa, riĉe ilustrita, kaj donas regule kaj artajn suplementojn kaj pm-donacojn, kaj kronikon kompletan de la novaj eldonaĵoj, kaj la liston de la membroj.

ĈIU ABONANTO RAJTAS 5 INTERŜANGANONCOJN SENPAGAJN.

Abonprezo: 15 frankaj belgaj,

pagotaj per poŝtmandato aŭ banko al JOS. PHILIPPEN,

Botermarkt 10 DIEST

krono en Esperanto estas leginda, eĉ tre leginda libro... (N. K.) Kiel ekzemplo de alta nederlanda literaturo, certe rekomendinda verko (Flandra Katoliko).

2°) *La Najtingalo*, dua eldono. Plej ŝatata Esp. kantaro. La unua eldono finvendiĝis en tri tagoj.

..... mi ne povas ne konsili: tuj aĉetu ĝin kaj kantadu por ke la krizo cedu! (Radiaro). Prezo nur fr. 2,50.

Eldonis: Esperanto Instituto MALNOVA TURO, Eindhoven — Ned. Mendebila pere de nia filialisto D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14, Wilrijk. P-konto n° 119.482.

W. J. THIEME & K-io

en Zutphen (Nederlando)

A) Stud-libroj :

ESPERANTO-WOORDENBOEK.

(Esp. - Nederl. & Nederl. - Esp.)

Verkis A. G. J. van Straaten, gvidanto de la Centra Esperanto-Kurso en Nijmegen, membro de la Ned. Esp. Ekzamena Komitato. En bela bindo : Fr. 80.—

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK. (Esp.-Ned. & Ned.-Esp.)

de A. G. J. van Straaten
En bela bindo : Fr. 40.—

H. J. Bulthuis, LA JUNA KOMENCANTO.

La plej unua Esp-a legolibreto por kursoj kaj lernejoj (kun klarigoj). En tri partoj. 1-a parto : Fr. 8,25 ; 2-a parto : Fr. 8,25 ; 3-a parto : Fr. 9,—. Ĉi-tiuj tri sinsekvaj partoj (amplekso resp. 46, 51 kaj 54 paĝoj) estas uzeblaj sen ia alia lernolibro, por hejma studado, kursoj k. t. p.

H. J. Bulthuis, RAPIDE KAJ BONE.

Du legolibretoj (por infanoj), ĉiu ĉ. 60-paĝa, plenaj de belaj bildoj, destinitaj por infanoj. Ili estas tre rekomendindaj ĉie, kie infanoj lernas Esperanton. Prezo de unu parto : Fr. 9.—

H. J. Bulthuis, LA JUNA ROBINSONO.

Legolibro kun klarigoj, tre taŭga por junaj Esperantistoj, kiuj intencas poste legi la grandan libron « Robinsono Kruso ». 50 paĝoj kun multaj bildoj. Prezo : Fr. 10,—

H. J. Bulthuis, ROBINSON KRUSO.

Legolibro por geknaboj, laŭ Campe. 3-a eldono. Bindita. Kiel « La Juna Robinsono », sed kun pli vasta kaj malpli facila teksto. Kun ilustraĵoj kaj parol-ekzercoj. Prezo : Fr. 32.—

W. W. van Alphen, ESPERANTO.

Lern- kaj legolibro por la uzado en lernejoj, kursoj kaj privata studado. Bindita. Prezo : Fr. 28,70. Ŝlosilo al ĝi : Fr. 10,—

Glück & Willems, LA VERBO EN ESPERANTO.

Teorio kaj praktika uzado Prezo : Fr. 10,70

M. de Waard, HET ESPERANTO-A EXAMEN.

Lern- kaj ripetlibro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj. Prezo : Broŝ. Fr. 15,60 Kart. Fr. 19,70.

M. de Waard, HET ESPERANTO B-EXAMEN.

Lern- kaj ripet-libro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj. Prezo : Broŝ. Fr. 45,10. Kart. Fr. 53,30.

M. de Waard, DEMANDARO KAJ RESPONDARO.

pri la historio de la Esperanto-Movado. Prezo : Broŝ. Fr. 23,— Kart. Fr. 26,25.

M. de Waard, EEN VERZAMELING ESPERANTO SPREEKWOORDEN EN ZEGSWIJZEN.

500 nederlandaj proverboj kun la korespondaj Esp-aj proverboj. Kun indekso de la vortoj. Prezo : Fr. 14,75

P. J. Soeters, MIA LERNOLIBRO.

Practische methode voor Esperanto. Prezo : broŝ. Fr. 19,70. Kart. Fr. 23,—

J. J. Rozendal, MI PAROLAS ESPERANTON.

Ekzercoj de lego, traduko kaj parolo, por kursoj, lernejo kaj hejma lernado. Prezo : Fr. 14,75.

B) Literaturo :

(Bonaj libroj kun grave malaltigitaj prezoj).

H. J. Bulthuis, KRESTOMATIO.

Simpla legolibro kun klarigoj ; entenas fragmentojn el pluraj Esp-aj romanoj k. t. p. Tre taŭga por tiuj, kiuj jam legis la libron « Robinsono » kaj volas plu progresi en Esperanto. Ĝi donas ankaŭ rigardon super la ekzistanta Esperanto-literaturo.

Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 69,70 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 40,— bind.

* H. Conscience, LA LEONO DE FLANDRUJO.

El la flandra ligvo tradukis H. J. Bulthuis. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 53,30 broŝ. ; Fr. 61,50 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

Charlotte Brontë, JANE EYRE.

El la angla lingvo tradukis H. J. Bulthuis, ano de la Esp-ista Lingva Komitato.

Antaŭa prezo : Fr. 86,10 broŝ. ; Fr. 96,75 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

« La bela esperanta traduko pravas, ke la tradukinto majstras la mondlingvon. Tial ĝi plene meritas esti legata kaj pristudata ». (Kath. Schoolblad).

Hendrik Ibsen, IMPERiestro kaj GALILEANO.

Mond-historia teatraĵo, tradukita de H. J. Bulthuis L. K.-ano. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 64,— bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

* J. v. d. Vondel, GIJSBRECHT VAN AEMSTEL.

La detruo de la urbo kaj lia ekzilo. Trage-

dio. El la nederlanda lingva originalo tradukis Ir. J. R. G. Isbrücker, membro de la Esp-ista Akademio.

Antaŭa prezo : Fr. 32,— broŝ. ; Fr. 41,— bind.

Nuna prezo : Fr. 16,40 broŝ. ; Fr. 24,60 bind.

« Cervantes en sia verko « Don Quijote » komparas la tradukaĵon kun la dorsa flanko de la teksita tapiŝo ; oni ja rekonas la figurojn de la teksto, sed ĉie elpendas faden-finaĵoj. Sed ĉe tiu ĉi tradukaĵo ne trafas la komparo de Cervantes : malgraŭ la malfacilaĵoj ; kiuj trudigis al la tradukanto, la libro staras sur la nivelo de la originalo, la famaj horoj vekas la saman impreson de kortuŝa simpleco, kiel en la originalo ». (Weekblad voor Gymn. & M. O.)

* Homeros, ODUSSEIAS.

El la antikva greka lingvo tradukis W. A. J. Manders.

Antaŭa prezo : Fr. 64,— broŝ. ; Fr. 76,25 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 34,50 bind.

« S-ro Manders per ĉi-tiu traduko pravas la grandan riĉecon kaj flekseblecon de la belsona Esperanto. Ĝi precize redonas la plej delikatajn nuancojn, kaj oni havas la impreson legi la originalan tekston de la senmorta eposo de la granda greka poeto. Oni ne povas sufiĉe varme rekomendi la libron ». « Het Laatste Nieuws, Brussel ».

La libroj signitaj per steleto estas en la listo de tiuj libroj, el kiuj la kandidatoj por la B-ekzameno devas legi almenaŭ 4 librojn.

La supre menciitaj libroj estas aĉeteblaj ĉe la Vendinstituto de F. U. K. E., D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝt-ĉekkonto n° 119482., kiu estas la filialisto por Flandrujo de la Firmo W. J. Thieme & Co, Zutphen.

La libroj estas sendataj aŭ frankite.



' RADIARO '

LINGVA GAZETO KATOLIKA

Monata eldono, 18-paĝa, eldono de
Katolika Esperanto Instru-Centro

JARABONO : 1.75 NED. GULD.
 Adm. J. Dercks, Antwerpschestraat, 43
 BERGEN-OP-ZOOM (Nederland)

Provnumeron ni sendas senpage.
 (Ĉiumonate abonebla).

FLANDRAJ
 ESPERANTISTOJ



EN ROESELARE
 ESTAS LA DE VI
 PREFERATA

PRESEJO


H. & H. BRAEKEVELT
 Statiedreef, 177 - Tel. 1080

Iedere groep, vereeniging of zaken-
 man gebruike vóór elk order onzen
 dienst voor inlichtingen en schetsen.

Specialiteit :
ESPERANTO - DRUKWERK

Imperial

Schrijfmachienen zijn de beste



Bureelmodel & draagbaar model
 ROESTVRIJ
 Het meest MODERNE Schrijfmachien
 2 JAAR WAARBORG

Eerste klas schrijflinten voor alle merken van
 schrijfmachienen & rekenmachienen. - Ellam's
 carbonpapier - Ellam's duplicatoren,
 stencils en inkten.

Bijzonder werkhuis voor herstellingen aan alle
 schrijf- en rekenmachienen.

TOBIE DE PRINS Tel. 216.20
 ● 32, Kathelijnevest, ANTWERPEN ●